HUNGARA VIVO



2

1973

8,— Ft

ABONO DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

Peranto al eksterlando: KULTURA Budapest, 62,P. O. Box 149. — Abonprezo por unu jaro en Usonaj dolaroj = 2,—

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

AUSTRIO: Globus (VAZ), Höchstädtplatz 3, A — 1200, WIEN I. Rudolf Novák Gmbh., Köllnerhofgasse 4, A — 1011, WIEN I.

AUSTRALIO: Cosmos Bookshop, 133 Auckland Street, ST. KILDA Vic. A. Keesing, 168—174 Day Street, SYDNEY, N. S. W. 2000

BELGIO: Agence Messagerie de la Presse, Rue du Persil 14—22, BRUXELLES

BRAZILO: Livraria Brody Ltd., Caixa Postal — 63366, SAO PAULO. Livraria D. Landy Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943, SAO PAULO

BRITIO: Collet's Holdings Ltd., Denington Estate, London Road, WELLINGBOROUGH.

The Danubia Book Co., 78 Shaftesbury Avenue, LONDON W. 1.

BULGARIO: Direkzia R. E. P. 11 Pl. Slawejkov SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO: P. N. S. — dovoz tisku, Vinohradska 46, PRAHA 2. P. N. S. — dovoz tisku Leningradska 14, BRATISLAVA

ĈINIO: Watwen Shudian, P. O. B. Nr. 88. PEKING

DANLANDO: Hunnia Books and Music Langemosevej 37, BAGSVAERD.

Ejnar Munksgaard Prags Boulevard 47, COPENHAGEN/S.

FINNLANDO: Akateeminen Kirjakauppa, Keskuskatu 2, HELSINKI

FRANCIO: Agence Littéraire et Artistique Parisienne 7 Rue Debelleyme, PARIS 3. Société Balaton 12 Rue de la Grande Batelière, PARIS 9.

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO: Zeitungsvertriebsamt, Fruchtstrasse 3—4, 1004, BERLIN

GERMANA FEDERACIA RESPUBLIKO: Újváry-Griff Titurel strasse 2, 8 MÜNCHEN 81.

Kubon und Sagner, Schliessfach 68, 8 MÜNCHEN 34. Kunst und Wissen, Postfach 46, Wilhelmstrasse 4, 7 STUTTGART 1. W. E. Saarbach, Follerstrasse 2, 5 KÖLN 1.

ISRAELO: Hadash, R. Nesz Ciona 4, TEL-AVIV Lepad Ltd., 15 Rambam, TEL-AVIV Gondos Sándor, Herzl 16, Bét Hakranot, HAIFA A. Fischer, R. Strauss 3. JERUSALEM

ITALIO: Avv. Andrei Lazar, Via Monte delle Gioie 24, ROMA S. Co. Lib. Ri., Piazza 33, ROMA

JAPANIO: Nauka Ltd., 30—19, Minami-Ikebakukuro 2-chome, Toshima-ku, TOKYO

JUGOSLAVIO: Forum, Vojvode Misica broj 1, NOVI-SAD — Jugoslovenska Knjiga, Terazije 27, BEOGRAD

KANADO: Délibáb Film and Record Studio, 19 Prince Arthur Street West, MONTREAL 18. Que. Pannonia Books, 2 Spadina Road, TORONTO 4, Ont.

KOREO: „Chul Bo" PHENJAN

NEDERLANDO: Swets et Zeitlinger, Keizersgracht 487, AMSTERDAM C.

NORVEGIO: A/S Narvesens Litteratur Tjeneste P. O. Box 6140 Etterstad, OSLO

POLLANDO: P. K. W. Z. Ruch, ul. Wronia 23, WARSZAWA

RUMANIO: OSEP, Gara de Nord, BUCURESTI OSEP, ORADEA

SOVETUNIO: Sojuzpechati, Import, Prospekt Mira 112—a MOSKVA

SVEDIO: A. B. Nordiska Bokhandeln, Drottninggatan 7—9, 110 10 STOCKHOLM 1. A. B. Sandbergs Bokhandeln, Sturegatan 8, 114 37 STOCKHOLM 5.

SVISIO: AZED AG., Dornacherstrasse 60/62, BASEL 4200. Metropolitan Verlag, Binningerstrasse 55,

ALLSCHWILL

USONO: Center of Hungarian Litterature Inc., 1538 Scond Ave., NEW YORK 10028.

Corvin Travel and Gift cond Ave. NEW YORK Parcel Service. 1590 Second Ave., NEW YORK 10028.

Hungarian Books and Records 11802 Buckeye Road, CLEVELAND, Ohio 44120

VENEZUELO: Luis Tarcsay, Calle Iglesia Ed. Villoria Apt. 21 — 105, C. 24. CARACAS

VJETNAMIO: Phong Phat Hanh Bao Chi 17, Dinh Le. HANOI

Hungaroj abonu por eksterlandanoj

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca
1973. XIII-a jaro, 2-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro: *d-ro Jozefo Mátéffy*
Lingva revizio: *K. Kalocsay*
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
D-ro Pál Avar, d-ro István Bácska Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ad Császár, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyar mathy, d-ro Lajos Lesznai, Alfons Pechan, Aurél Ponori Thewrew Mária Szabó, d-ro István Szerdahely Tibor Újlaky-Nagy, Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:
D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkány Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludo viko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

La redakta komitato la unuan ĵa don de ĉiu monato posttagmeze de tria ĝis la kvina horo havas ako totagon. (Bp. VIII., Kenyérmező utca 6.)

Eldonas: „Népszava" Gazeteldo Entrepeno, Budapest, VII., Rákóc út 54.
Telefono: 224-819

Responda eldonisto: Márton Gábo direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abo nebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la ga zetkolportistoj de la Centra Gazeto ficejo de la Poŝto (K. H. I., Budapes V., József nádor tér 1.) senpere, a per poŝtmandato.

La abono estas por jaro Ft 32,—, a eksterlando krome Ft 6,40 por afranko.

73.599 Békés megyei Nyomdaipa Vállalat, Gyula
Indexszám: 25.377

E HUNGARA VIVO

XIII-a jaro, 1973. 2-a numero

Numero pri Gyula Illyés

ENHAVO

yula Illyés sepdek-jara 1
y. Illyés: Sur la boato de Kharono, *tr. Kalocsay, Tárkony* . . 4
y. Illyés: Bartók, trad. *K. Kalocsay* 6
y. Illyés: Sándor Petőfi, trad. *J. Mátéffy* 7
y. Illyés: La popolo de la „puszta", tr. *E. Fenyvesi* 8
Balkányi: 1975-Internacia Finn-Ugra Kongreso 9
Szekeres: Panoramo 10
oltán Molnár: Böce, Voĉo, trad. *Szilárd Bálint* 12
nre Szenes: La centjara Népszava 13
. Pallós: Vizito en librovendejo 14
-ro Lajos Lesznai: Muzika vivo 16
ihály Gergely: Miklós Borsos . 17
iklós Borsos: Du skulptaĵoj . . 17
tván László: Vizito en la Atomkern-esplora Instituto 18
árton Fejes: Jardekoj en la serro de hungara kulturo . . . 20
.jbareco, amikeco (T. Kulagin, R. Haabvere) 22
ajos Tárkony: Revuo de revuoj 24
icilaj legaĵoj (Ida Tarján, Ada Csiszár) 26
. Balkányi: Spirita eksporto . . 27
. Kökény: Hungara Fervojista Mondo 27
ecenzo (Kalocsay) 27
. Kökény: Esperanto en la Budapeŝta Scienca Universitato . 28
. Benczik: Ekzameno sen risko 28
da Csiszár: L. Kökény—Ni konversaciu Esperante! 30
eterkesto, Korespondi deziras . 30
ERI: Krucvortenigmo (pri Gy. Illyés) 31
nteresaĵoj 32
éza Kurucz: „Juna amiko" kaj la lernantaro 32

Sur la kovrilpaĝo: Miklós Borsos – Torso (marmoro)

La 3-a numero de HV estos: Numero pri de Budapeŝto
La 4-a: Numero pri Sándor Szathmári

GYULA ILLYÉS SEPDEK-JARA

Kun sincera apreco ni salutas Gyula-n Illyés en lia sepdeka naskotago. Ni salutas la elstaran poeton kaj la majstran fleganton de la hungara prozo, la dramverkiston, la eseiston kaj tradukartiston, kiu konstruis per siaj verkoj kolosan interligan ponton inter la kulturoj de la popolo kaj de la mondo. Ni salutas tiun hungaran verkiston, pri kiu la tendaro de la valor-konaj kritikistoj kaj la bona publika opinio jam de jardekoj scias, ke li estas klasikulo, kaj kiu ankaŭ kiel klasikulo estas vigla, homproksima kunulo, sentema observanto, incitita vipanto kaj mentorvoĉa instiganto de la spiritaj tendencoj kaj fluktuantaj plenumoj de nia epoko. Per sia duonjarcenta literatura laborado Gyula Illyés alojis en mirindan unuecon la respondecon de la artista konfeso kaj de la persisto en la publika vivo. Lia fekunda maltrankvileco rilate la publikan vivon neniam forŝiris sin disde la aktivado de la kreanto kaj artisto; liaj manifestaĵoj pri la publika vivo okazis neniam anstataŭ kreado. Liaj poemoj, dramoj kaj prozo portis ĉiam la ŝarĝojn de la publika vivo. Jen, kial ni sentis kaj sentas aprobitaj la vortojn de Gyula Illyés, la beletristo kaj la homo senpere ekparolanta en la publika vivo tiam, kiam li preparas lokon por la historia justeco en la mensoj kaj koroj, kaj ankaŭ tiam, kiam liaj rezonadoj invitas al diskuto.

Kara Gyula

Kiel stranga estas la sorto! Ĉu vi pensus antaŭ dudek ses jaroj, kiam sur la scenejo de „Magyar Színház"[1] *ni provis vian dramon, kaj fine ni prezentis ĝin sub la reĝisorado de Bandi Gellért — kiu poste tiom da viaj belaj dramoj surscenigis — ke post dudek ses jaroj, t.e. post kvaronjarcento (prefere mi skribu dudek ses jarojn, tio estas pli favora por ni ambaŭ), sekve de la honoriga komisio de iu revuo mi salutos vin en letero kiel la plej grandan hungaran poeton? Dum dudek ses jaroj vi restis la florkronita poeto de la nacio — tiel oni kutimas diri, ĉu ne —, majstro kaj gardanto de la belaĵoj, fajroj, gustoj kaj ŝiko de la hungara lingvo. Aliaj certe pli fakscie, pli longe komentos vian laboradon, sed permesu al virino, kiu estas hungara aktorino, ke ŝi salutu en vi, okaze de via naskotago, la fleganton de la bela parolo, de la belaj vortoj. Vi scias, ke antaŭ nelonge mi instruis la scenejan parolon en la Aktoreduka Altlernejo, kie eble unu el la plej belaj „instrumaterialoj" estis kelkaj viaj poemoj. Per ili mi provis veki — mi timas, sensukcese — la febron de miaj lernantoj por la gepatra lingvo. Spite ke per orelo estas sperteble, kiel difektiĝadas la vivanta hungara parolo, mi kredas, ke tiel longe, dum ĝin evoluigas kaj pliriĉigas tiaj lingvoflegantoj kiel vi, Gyula, la senso por ĝi ne malkreskos, ne povos formalkreski en la homa komuneco, en la publiko. Kiom-ajn-foje, kiam mi povas reciti viajn vortojn — bedaŭrinde en la teatro malofte estas eblaĵo por tio, jen la kaŭzo, ke mi devas kontentiĝi per la gustumado de viaj sendaĵoj-volumoj —, kun ĝojo mi ĝuas ilian belecon. Fakte mi refreŝiĝas de ili. Tiel mi estis ankaŭ, kiam mi povis reciti la tradukon de la Trojaj Virinoj de Eŭripido-Sartre en „Vígszínház"*[2] *De post la dramo „La psikologo", tiu ĉi teatraĵo de Eŭripido, tralaborita de Sartre, estis la sola Illyés-dramo — ĉar vi tradukis ĝin tia, kvazaŭ ĝi estus via propra — en kiu mi povis ludi . . .*

---

[1] „Hungara Teatro"
[2] „Gaja Teatro"

Mi ne devas daŭrigi la frazon, ĉu ne? Vi scias ja, kion povas deziri aktorino. Ludi, ludi rolon en dramo de Illyés, rolon konvenan al mi. Aŭ almenaŭ rigardi aŭ legi liajn pli kaj pli novajn verkojn. Al la kreo de tiuj mi deziras bonan sanon kaj longan junecon al mia ŝatata poeto.

Ame: Mária Sulyok

P. s.: Al la kara Flora mi petas, transdonu mian saluton.

***

László Németh, verkisto:

„(...) mi rigardas Illyés kiel stelon, kiu aperis tie, kien mi antaŭkalkulis lin. Mi vidis la eblaĵojn de la hungara liriko kaj mirante mi ĉirkaŭrigardis: ĉu neniu entreprenas realigi ilin? Nun, jen estas la stelo, kaj mi, malperfekta astronomo, spirretene gvatas, ĉu ĝi kuros en tiu direkto, en kiu ĝi devas kuri laŭ miaj naivaj formuloj. *(Nyugat, 1929.)*

***

Mihály Babits, poeto:

„(...) tra la nebulo de la tedateco pro la formoj kaj tra la senelirejoj de la ismoj jam longe brilas kiel plej ĉefa eblo, kiel plej malfacila kaj plej necesa tasko (...) la revivigo de la hungaraj kaj popolaj formoj kaj ilia modernigo. Kia ĝojo estas scii, ke ekzistas novaj poetoj, kiuj eĉ plenumis jam tiun taskon! Kaj tio estas pli ol tasko pri formoj. Pere de la poemo de la popolo io eniras la literaturon el la animo de la popolo: plia simpleco, plia pureco, la spirito de la „jarcenta milda malriĉeco". La poeto de tiu spirito estas Gyula Illyés, kiu scias esti la poeto de la popolo, sen perfidi la kulturon kaj tiu de la kulturo, sen perfidi la popolon. Li scias altenflugi, dume resti mola kaj tenera; li scias disradii amon kaj justecon en la armeo de Dózsa. Li estas revoluciulo ideala, el la speco malnova kaj eterna (...). (Nyugat, 1932.)

***

Lajos Nagy, verkisto:

Mia rilato al la libro de Gyula Illyés estas tute speciala. Ni kune faris tiun certan Ruslandan vojaĝon, pri kiu tiu libro raportas (...). Sed neniel mi povis imagi, kion skribos pri ĝi mia amiko Illyés (...). Kiel li defendos sian verkistan reputacion, sian homan dignon, eĉ, sian honeston kontraŭ tiuj (...) homoj, kiuj scias rigardi ĉiun ajn fenomenon de la mondo nur vidpunkte de la aktuala politiko. Ĉu li skribos, ke Stalin estas bela homo, eĉ, prudenta homo — kiam tio estas konsiderata komunisma propagando (...) Niaj verkoj (...) diferencas unu de la alia. Al mi ŝajnas, ke dum mi restis simpla pasaĝero, kaj ne kapablis pli ol senemocie priskribi la faktojn (...), Illyés permesis al si esti poeto (...). Kaj nun sekvas por mi la surprizo. Tiel mi vidas, ke la realon pli bone prezentas la divenaĵoj de la *poeto*, ol la preskaŭ pena insisto pri la *atestaĵoj*. *(Nyugat, 1934.)*

***

Jenő Katona:

„La popolo de la pustoj" estas la plej perfekta klasportreto de la hungara literaturo (...) per la libro de Illyés la granda mutulo de nia historio, la popolo de la hungaraj agroservisto-domoj diskrias sian nedireblan suferadon. *(Magyarság, 1936.)*

***

György Bálint,
ĵurnalisto, verkisto:

Legante lian verkon „La popolo de la pustoj" plurajn fojojn mi havis la senton, ke mi devas ekkriegi. Tiu brile verkita, impona libro donas la inferan vizion de la korpa kaj morala humiligo. De tempo al tempo mi interrompis la legon kun mano pugniĝinta. Parton de ĝi mi legis dum mia restado en Hispanio, unu semajnon antaŭ la kontraŭrevolucio de la hispanaj kampulsubpremantoj. Sur hispana tero mi legis ankaŭ tiun ĉapitron, kiu temas pri la korpa punado de la agroservistoj (...) kaj mi legis la paĝojn plenajn de forto demonatemantajn pri la seksa submetitece de la knabinoj-agroservistinoj. Jes mi volis kriegi kaj brulmarki kiekunkulpulon kaj „kamuflanton" ĉiun hungaran verkiston, kiu skribas kaj parolas pri alio ol pri tiu kontinua, nepunata malhonorige de la digno de multaj centmiloj dehungaraj homoj. (Gondolat, 1936.

***

György Bálint:

La Petőfi de Gyula Illyés, kiuverkon spiroretene mi ellegis, estas la plej bela kaj plej kuraĝa Petőfi-revizio de longa tempo. De su la originala portreto li delavas lapseŭdoportreton ŝmiritan sur ĝinkaj post lia mano, kiun gvidis lasindona amo al Petőfi kaj la malrespekto al la falsaĵoj, la vera vizaĝo de la poeto brilas antaŭ ni ensia pura kaj sugestiva belece (...). Liajn postulojn (tiujn dePetőfi) hodiaŭ oni jam ofte entombigas laŭ lia stilo, per liaj supraĵe kaj malbone imititaj gestojkaj starigas super ilin lian aĉe kafalse malsukcesintan statuon. Lalibro de Illyés estas belega protestekontraŭ tiu praktiko. (Pesti Napló1937.)

***

László Gara,
tradukisto, redaktoro

Nun, kiam la longa tempo, pasinta ekde la komenco de la kariero de la poeto, ebligas al ni rigardi la vivoverkon de Illyés e certa perspektivo, decide ni povaaserti, ke en siaj verkoj li solvila multe diskutatan problemon: ĉula evoluigo de la patrolingvo, ala sinteno de la verkisto kontrala homamasoj igas progresi la literaturon. Nome li solvis la problemon. aplikante ilin ambaŭ sur lasama ebeno. *(El lia volumo „Lanekonata Illyés", Washington1965.)*

***

André Frenaud:

Li estas poeto, kiu ĉeestas la historion, kiu konas la homajn malperfektaĵojn, sed ankaŭ la necesan kuraĝon al la vivo; kiu ne trompiĝas kaj ne trompas nin, kiu entreprenas la antagonismojn, sed tamen elektas la fieron. Li konas la paseon kaj serĉas la futuron, estas unu el la popolo kaj estas lumanta torĉo por sia popolo. Li estas poeto plena de respondeco en tiu ĉi malperfekta mondo. (1966; Antaŭparolo al la Illyés-volumo en la pretiĝanta serio „Poétes d'Aujourd'hui".)

***

Umberto Albini:

La hungaroj, se juĝi laŭ iliaj poetoj, tre ofte kaj tre volonte aplikas kvalifikan noton laŭesence formalan: ili kondamnas verkiston simple pro tio, ke ili juĝas mankohava lian konscion pri sia hungareco. Kaj ili admiras siajn naciajn poetojn, kiel ekzemple Arany kaj Ady, pro la abundega vortprovizo, kiun ili uzas. La stilistika mondo de Illyés kunligas per sia propra leĝo ambaŭ tiujn ekstremojn — ĝuste interese de tiu rigardo — en la vejno-kolektujo de la plej bonaj hungaraj naciaj tradicioj. *(El la antaŭparolo de „Poesie di Gyula Illyés", 1967.)*

***

Mihály Czine,
literatur-historiisto, redaktoro:

„La kritikoj menciis lin inter la plej enigmaj poetoj. Ili vidis lin jen ridetanta revoluciulo, jen burĝo, jen konservativulo, jen modernulo plenkreskinta en la lernejo de la avangardo; ili opiniis lin jen kampulo, jen mondumano. Lian hejmon ili serĉis jen en Parizo, la metropolo, jen en la Transdanubia stepokorto Ozora. Al tio donis ioman bazon lia nekutima, multkolora poezio, en kiu alternis kaj intermiksiĝis febra pugno-skuo kun paciĝinta mansvingo.

Malantaŭ la cent vizaĝoj troviĝas kompreneble unusola poeta personeco. Dum sia tuta kariero li estis revoluciulo kaj hungaro-eŭropano. Revoluciulo, kiu konservis ĉiujn heredaĵojn de la paseo kaj hungaro-eŭropano, kiu trovis la akordon inter tio, kio estas nacia kaj kio estas ĝenerale eŭropana. Sian naskoteron Ozora, tiun Transdanubian vilaĝon, li kunkonstruis kun Parizo.

Lia nomo havas bonan reputacion ankaŭ en eksterlando. Alain Bosquet, la fama franca poeto kaj kritikisto vicigas lin inter tiuj 3—4 poetoj, „kiuj en la plena senco de la vorto estis kapablaj igi sia propra la animon de la epoko (...) Li estas la plej granda stilartisto de la hodiaŭa hungara prozo (...) Krom en la lirikon kaj en la rakontan poezion Illyés skribis sian nomon ankaŭ en la historion de la dramo." (Jelenkor, 1969.)

Ĉi tiun kompilon ni publikas laŭ la revuo „Kritika".)

Tradukis: Tibor *Újlaky-Nagy*

Dum Via vojaĝo en Hungario certigas Vian komforton

EN STACIDOMOJ
restoracio, bufedo, nutraĵpavilono
EN TRAJNOJ
litvagono, restoracivagono, bufedvagono
EN ŜIPOJ
restoracio, bufedo
EN LONGDISTANCAJ AŬTOBUSOJ
bufedo

UTASELLÁTÓ

Favorpreze certigas la manĝigadon de turistaj grupoj la Pasaĝerproviza Entrepreno. Informojn donas kaj laŭdezire skribitan informon sendas la Pasaĝerproviza Entrepreno, Budapest V., Veres Pálné u. 24 Tel.: 189-900/160

Gyula Illyés:

Sur la boato de Kharono

Ne tiam kun ni startas la barko de Kharono,
kiam l'okuloj frost-rigidas.
Ni, transirantoj mornaj, apert-okule, longe
jam sur la fata akvo glitas.

Jam antaŭ jaroj pelas nin la envia sorto
luliĝi sur boato, naĝa
laŭ long' de ĝuste tiel ravante bela bordo,
kvankam sur voj' ne tre laŭplaĉa.

Sur ĝuste tiel ravaj Canale *kaj lagunoj,*
kiel ĉe nuptvojaĝ', delekte;
ja ĉio estas sama, ĉielo, voj', pejzaĝo,
nur, ke retrodirekte.

Ja ĉio tiel ravas, kaj eĉ — sekrete — estas
pli rava, kiel ĝi forpasas,
iel simile, kiel la melodio, tial
ke l'violonon ĝi forlasas.

Sub niaj arboj inter amikoj ni sidadas
kaj ridas dum diskut'plezura,
kaj jen, ekbalanciĝas kun ni (kaj sole kun ni)
la bark' eksteren ekvetura.

Saĝul', kiu eĉ dum ĉi plezurvojaĝ' ridetas,
aŭ, eĉ larmante, larmas danke,
ke tiom da piazza *kaj tiajn* Casa d'Oro
li vidis, eĉ se revid-manke.

Tr.: K. KALOCSAY

Ilustraĵo de Miklós Borsos

— La piĵamoj! Kie ili estas?

En la plenŝtopita kamero mi serĉadas haste, je la kvina tagiĝe, antaŭ ekiro al la fervoj-stacio.

— Kiaj piĵamoj?

— La du kvinlitraj.

— Piĵamoj? — en la ĉiam pacienca, ĉarma, kuracpedagoga akcento eksonoras miro. Ni konas tiun manmovon de incitiĝo, per kiu ni gestas rezignacie pri nia stulteco. Tia gesto enkondukas ankaŭ la sekvan frazon:

— La dameĵanoj!*

O

Kaj nelonge poste, kun preskaŭ la sama cerboelartikiĝo:

La dorson de libro mi devas glui por povi ĝin reporti al la biblioteko. Ankaŭ tio okazas frumatene, tiel same urĝate:

— Do donu jam al mi tiun sodo-bikarbonaton!

— Por gluado?

Kun la antaŭa interna gesto de incitiĝo:

— Gumon araban.

O

La forpasado el la vivo estas humura. Por buboj, ankaŭ blaga flankbato aŭ senatenda krurfalĉo estas humura. Ĉi tio estas la spirit-nivelo de la morto; per tiaĵoj ĝi komencas flankumi ĉirkaŭ ni, kaŝiĝante-embuskante doni al ni signojn. Sed kial ni miksas nin en tiujn lernejkortajn, lerno-paŭzajn gimnastikaĵojn? Ni proksimiĝas al la tombo per

---

* *Dameĵano:* dikventra botelego surplektita per vergetoj uzataj por korbofaro.

ancpaŝoj, kaprioloj. Estas jam tempo, ke ni konsiigu nin pri tio.

O

Unu sola malfacila demando ekzistas en la tuta ilozofio: la memmortigo. Ĉu la vivo valoras tiom, e ni ĝin akceptu, ankaŭ propravole?

Nia vivo pretendas la eternecon. Sekve, kia ajn kcepto de la morto estas memmortigo. Ankaŭ la kcepto de la maljuneco. Tamen, kian elekton ni avas, se ni ĝin ne akceptas? Ankaŭ tiam ni elektas a. Per nia silenta konsento.

La sola demando de ĉiu imagebla filozofio estas ropre la maljuneco.

Jen la konstanta kontraŭdiro.

O

Mi ne partoprenas en la konsolo de la religio, sed natene mi malsupreniras, ankaŭ nun vintre mi malsuprenglitadas sur la Szemlő-monto al la Lukas-baejo, kaj tie, en la senferma baseno, ankaŭ dum eĝfalado, mi tranaĝas mian tagan porcion. Tio stas preskaŭ tia, kiel la patrino de mia patro, tuj iam ŝi venis loĝi en la vilaĝon, paŝetadis al la rumatena „rorate"-meso. „Ĉar tio tiel trankviligas nian animon!". Ĉar tio tiel trankviligis ŝian tenaan-tendenan bonan korpon.

Kian konsolon — nome kion praktikan — la religio povas doni, ties detaligo apartenas al la temo norto. Kontraŭ la gravaj momentoj de la maljuniĝo, eordinaran konsolon donas ankaŭ la bone fiksiintaj kutimoj. Ĉar ankaŭ ili sufloras ian stabilcon, ian sentempecon. Ĉiutage malsupreniri al la afejo por ludi partion de ŝako, jen ĝuste tia sama onto, kia la frumatena meso kaj litanio-kantado iutagaj estis por mia avino. Cetere, ŝia edzo, mia vo, el ĝuste tia animleĝeriga bezono suprenpaŝetis iutage en la vinpremejon.

Do, kontraŭ la korpaj-animaj malkomfortaĵoj de a maljuneco, memdefendo de ne lastranga efiko stas aranĝi kaj ripeti laŭ certa ritmo la farendaĵjn. Tio estas, ni butonumu strikte la tempon. Alie, a tempo nin dancigos laŭ sia freneza — nehoma — laĉo.

Nenion do ni povas rekomendi pli varme al la naljuniĝantoj, ol aktivecon daŭrantan ĝis la monento de la morto. La morton ni povas hontigi nur er tio sola, ke ni ĝin ne atendas.

O

Kial ĝuste tiuj havas inklinon por loĝejkontstruo iuj jam ne longe loĝos sur tiu ĉi tero, ankaŭ ĉi iun kontraŭdiron solvas tio, ke la maljunuloj kredas je la senpereeco: ili propre konstruas monumentojn, iajn modernajn tombokamerojn por sia pirito, moderniĝintan faraonan piramidon.

Kial ili trovas plaĉon tiel same pri ĝarden-aranĝo, urb-aranĝo, socio-aranĝo, tio estas samdevena: ili kredas je la futuro. Ili kredas je la homa raso. Ili kredas je la formebleco de la futuro kaj de la raso. Ili kredas eĉ je la bridebleco de la tempo, en la batalo kontraŭ la malbono, kontraŭ la Plej Ĉefa Malbono. Kaj ĉar ili faras por tio kreaĵojn — rimedojn kaj armilojn —, pli rezulthava estas ilia kredo, kiuj iras la finon de la vivo, ol ties kredo, kiuj staras, kiel oni diras, antaŭ la vivo. La maljunuloj estas la bone-ribelantoj, la grando-volantoj. La maljunuloj estas la junuloj.

O

La grandan hungaran epopeon pri la fortikaĵdefenda *Zrínyi* verkis ties pranepo dudekses-jara, alian hungaran epopeon „La rifuĝo de Zalán" dudekdu-jara junulo, la fabeleposon „Johano la Brava" verkis bubo. Kaj la plej saĝan, pleje ĉio-superan ĉefverkon de nia literaturo, „La Tragedion de l'Homo", verkis tridekkvar-jara komencanta homo.

En Romo, laŭ la ordono de la reĝo Servius Tullius, la nomon *juvenes* rajtis havi la viroj ĝis sia kvardekkvina jaro. Sed post tio ili fariĝis *seniores.*

Grizulo, oldulo, maljunulo — ĉi tio estas neregula komparacio por klasi la aĝulojn. Plua supera grado de maljunulo estas la kadukaĝulo.

Vir-aĝo ne ekzistas. Pli ĝuste, oni ĝin ne atentas. En la kurego inter lulilo kaj ĉerko ĝi forfulmas plej rapide. Vere, oni povaŝ ĝin nur antaŭe imagi kaj poste revoki en memoron. Laŭdire, ĝi estas la vivo.

O

Bone proksimiĝi al niaj finaj tagoj estas ĝentileco. La ĉefekzameno de la etiketo de l' maljuniĝo estas tio, kiel ni fermas post ni la pordon. Kiel ni malaperas post la kurteno, kiu finas nian groteskan komedion. Jen je kio ni devas nin prepari kun tiu pripenso, ke eĉ la morto de papilio estas skandala kontraŭdiro.

Kaj tiu, kiu faris ion konsiderindan en sia vivo, maljuniĝinte devas paroli jene:

Permesu, ke proprapiede mi retiriĝu en la fonon. Ne admonu min por pluaj plenumaĵoj. Ne trompu min, ne malmodestigu min. Ne komprimitigu per kadukaĝa altrudulo tiun freŝflaman junulon, tiun tenacan viron, kies memoron ankaŭ mi gardas bone en la koro. Metu antaŭ mi glason da vino, sed ĝin mi danku nur per manmovo, eĉ la vizaĝon mi ne devu turni al vi. Kredu, ke la morto estas venkebla, eĉ se, jen, mi falis. Eĉ se ni ĉiuj falos; persiste, kiel soleca ariergardo, ĝisfine, kiel ni solene promesis.

Tr. L. Tárkony

Ĉu vi ŝatas HUNGARAn VIVOn? Rekomendu ĝin ankaŭ al viaj amikoj!

GYULA ILLYÉS

BARTÓK

„Dissonon"? Jes! Se por ili disson',
kio por ni estas konsol'!
Jes, ekkrakantan
krevbruon miksan kun blasfem'
de glas' falinta, ve-ŝrikantan
grincadon de fajlil' en interprem'
de segildentoj lernu kaj
violon' kaj kanta gorĝ' — ne estu gaj'
nek pac, en la orita kaj elita
muziksalono fajna, forfermita,
dum ne en ĉiu koro mornrigida.

„Dissonon"? Jes! Se por ili disson',
kio por ni estas konsol',
ke la „popolo" havas ja
animon kaj ĝi vivas ja
kaj voĉas, kvankam variantojn
sakraĵn
de intergrincoj akraj
de ŝton' kaj fer' sur kordoj
de bonagordaj fortepian' kaj gorĝoj,
se sian sombran veron la ekzisto
povas konfesi nur per tio,
ĉar ĝuste ĉi „dissono"-kreo,
ĉi inferbruo-kirla batalveo
estas krio
por harmonio.
Ĉar ĝuste ĉi vekrio
— tra tro da mensogbela melodio —
vokas al sort' por harmonio,
por ordo vera, aŭ pereos ĉio,
la mondo ja pereos, se ne
revoĉos la popol' majest-solene.

Sek-statura, severa muzikisto,
hungar' fidela (kaj
„notora" kiel tiom da kunuloj),
ja estis leĝ' en tio, ke vi ĝuste
el la anim-profundo de ĉi tiu
popolo, kien vi descendis,
ke ĝuste tra la sonfunelo
de l'minofaŭk ankoraŭ strikta
de ĉi popolo vi la ŝrikon
suprensendis
en fridan kaj aŭsteran salonegon,
kie la lustroj estas mem la astroj.

Ofendas nian triston, se frivola
konsol'ludiĝas al l'oreloj;
patrinjo mortis, ĉu do ŝin funebru
danckantaj son-mieloj?
Pereis patrolandoj, kiu do kuraĝas
priplori per gurdad' leĝera?
Ĉu estas espereble pri l'homraso? —
dum kun ĉi zorgo mutas mens' en
tristo,
vi voĉu, ho severa,
vi, granda, „agresiva" muzikisto,
ke tamen estas por ni bazo
esperi kaj plu vivi.
Kaj rajtas ni sen embaraso
— ni, ĉar mortalaj kaj viv-kovaj —
kontraŭrigardi fikse tion,
kion eviti ni 'stas ja senpovaj

Ĉar plikreskigas, kiu surkovras la
malbonon.

Ĉar eblis, sed ne eblas plu,
ke okulvinde kaj orel-ŝtopinte
oni elmetu nin sub la ciklonon,
kaj post ties detru'
nin oni skoldu: vi ne helpis inde.
Vi nin honoras per malkaŝo
de malkaŝita al vi realaĵo:
bono, malbono, virto, krim-makuloj,
kaj nin grandigas ja, ke vi parolas
kun ni kiel kun egaluloj.
Jen kio nin konsolas!
Ĉi dir' alia, tiu de la vero,
kaj homa, ne falsforma,
donanta rajton, forton al plej
morna:
al la despero.

Ni dankas ĝin,
la forton por triumf-konkero
eĉ super la infero.
Jen bona fin': avanco-dona fin'!
Jen la ekzemplo: kiu bele elvolvas
la teruraĵon, tiu ĝin dissolvas.

Jen kiel do respondas pri l'ekzisto
granda animo kaj artisto:
li diras, ke valoris trasufero
de tia infero.
Ĉar ni ĝisvivis, kiajn nomi verbo
ne estas en homcerbo.

Du-nazaj junulinoj de Picasso
liaj stalonoj, la seskruraj,
nur ili povus ja elvei en ekstazo,
elheni, galop-kuraj,
kion, ho homoj, devis ni elteni,
ne-travivint' ne povas ĝin kompreni,
mankas kaj eĉ ne povas esti vorto
tiela,
sole muzik', muzik', muzik', kiel
la via,
ekzemplodona granda par' ĝemela,
muzik', muzika, nur muziko, plena
de praa varmo de min-fund' plej ena,
„futuran kanton de l'popol'" vekanta,
por triumfigi ĝin fleganta,
kaj tiel liberiga, ke de la karcero
eĉ murojn disruiniganta,
por promesita savo sur ĉi tero
per blasfemvortoj petpreĝanta,
altardetrue ofer-dediĉanta,
vundante sanon alsorĉanta
muziko, bone elaŭdantan rondon
levanta en pli bonan mondon.

Laboru, kuracisto bona,
kiu nin ne enlulas revoflustre,
sed per la fingroj de l'muzik'
esploras
animon nian, surpalpante ĝuste
kie nin plej doloras;
kaj tiel strange panaceo-dona,
ke l' veon, kiu fontus bruste,
sed fonti ĝi ne povas,
anstataŭ ni, naskitaj kun kor-muto,
vi kun la tuto
de via nervkordaro elsonoras.

Tr.: K. KALOCSAY

Gyula Illyés:

Sándor Petőfi



(El la enkonduko de la 500-paĝa libro, aperinta en pluraj eldonoj kaj tradukita en plurajn lingvojn.)

La grandaj poetoj ne ekparolas senatende, nek el la hela ĉielo, kiel la diaj manifestadoj. En la vivo de la popoloj malproksimen retroirante oni povas konstati, kiam ili ekakuŝis por naski la eksterordinaran filon. La nacio, la granda familio preparas sin antaŭe por la evento.

Ĝi antaŭe instruas la vartistinojn, kiuj flegos la novnaskiton, donos en lian buŝon la vortojn de la gepatra lingvo. Ĝi purigas ankaŭ la vortojn. Poste ĝi edukas instruistojn, kiuj direktos la filon. Ĝi zorgas pri lernolibroj same kiel pri la donacoj kaj riproĉoj de la onkloj. Ĝi elektas bonajn amikojn kaj rivalojn, kiuj lin defendos kaj instigos.

Ĉar ne estas certe, ke la bebo naskiĝos. Eĉ se li naskiĝis, ne certas, ke li adoleskos. Ho, kiomfoje turniĝis la sorto de la hungara popolo tiel, ke nur profeto estus povinta ĝin elgvidi el ĝia mizero. Kaj tiu profeto vere anonciĝis. Sed kiomfoje tamen li ne anonciĝis. La popolo staris antaŭ nova vojo soifante la vorton kaj la signon. Kaj vane ĝi atendis. Al kiu la historio donis voĉon kaj intelekton por la granda rolo, tiu ne aperis. Eble en lia kvina aĝo sufokis lin la difterio. Aŭ li ne povis elbarakti el la malluma profundo, en kiu vivis la milionoj de la popolo kaj li restis ĝis sia morto bovinpaŝtisto aŭ lia maltrankvilo drivigis lin maksimume en la vivon de banditoj. Eĉ lia korpo naskiĝis, sed lia spirito ne povis veni en la mondon, ĉar tamen oni ne zorgis pri li, ĉar la nacio estis malbona patrino.

En tia ekscito vivis Hungario ĉe aŭroro de la nacia renaskiĝo. Ĝin kaŭzis tio: ĉu povas renoviĝi ĉi tiu lando? Ĉu ĝi firme staros sur sia loko en la novepoka granda konkuro de la popoloj? Ĉu entute ekzistos hungararo, kaj, post la grandioza paseo, ĉu la futuro ne rezervas por ĝi la morton? Ja vere, nur nun komencas la nacio rekonsciiĝi post la preskaŭ kvarcentraja terura fortostreĉo, kun kiu ĝi retenis la turkon invadantan al Eŭropo, fine retenis lin preskaŭ per sia propra korpo ruliĝante kun li sur la tero, sed eĉ tie premante lin tiel, ke li ne estu delasita, kiom ajn tio kostu. Tio kostis tiom, ke sur trikvarono de la lando, sur la plej prosperanta parto restis nur fundamento de la urboj kaj vilaĝoj, la fekundaj teroj fariĝis marĉoj, la naŭdekono de la loĝantaro pereis. Nun eĉ la restaĵon minacas neatendita danĝero. Oni volas ekstermi eĉ ĝian radikon el la fruktoĝardeno de la popoloj.

Nur tial, ĉar — nun komencas tio malkovriĝi — ĝi estas ne nur laŭ speco tia, kiu ne havas parencon en la konataj mondpartoj, sed eĉ lingvon uzas tian, el kiu, krom ĝi mem, eĉ literon ne komprenas aliulo. La malnovan belan diron, ke Hungarlando estas la ŝildo de kristanismo, ripetadas jam nur la hungaroj kun memironio buŝangule kaj kun kapobalanco signifanta: nu, tio valoris sian prezon.

„Kio okazos al ni?" — pensis dise en ĉiuj partoj de la lando, en mil kaj mil kamparankabanoj tiuj, kiuj viglante atendis la novan jaron. Aparte ĉiuj pensis nur pri unu, pri la komenciĝonta jaro, sed la multaj apartaj zorgoj kune signifis turmentojn de dek milionoj da jaroj.

Ekstere oni sonorigis, komenciĝis la nova jaro, tiu de 1823. Kiel la gongobato ĉe la disiro de la teatrokurtenoj: tio same ekigas antaŭ ni la agojn.

En malgranda vilaĝo de la hungara Ebeno, en kamparana domo de Kiskőrös, kiu per nenio diferencis de mil kaj mil da kamparanaj dometoj en la lando, eta virino kun nigra hararo ekkrias; ŝi akuŝas. Slovake ŝi vekriadas. Dumtage ĝenerale ŝi parolas hungare, sed la preĝo kaj la ploro ŝiras el ŝi la vortojn de sia infanaĝo.

Ŝia edzo aŭskultas ŝin el la kuirejo. La senkonsciaj vortoj, kiujn la timo kaj senpovo puŝas al la lango, hungare filtriĝas el inter liaj dentoj.

Fine elinterne aŭdiĝas infanploro, la internacia plendo de la beboj pro la akra aero, malvarmo kaj vivo, pro tio ke ili venis en la mondon. Naskiĝis filo, la heroo de ĉi libro. Laŭ la postaj vortoj de lia patrino li estis etulo ne pli granda ol pugno. Oni pakis lin en buŝtukon, mezuris lin sur pendigebla foira pesilo; oni trovis lin tre malpeza. Poste oni banis lin tre rapide, nome tiel, ke oni verŝis en la malvarmetan akvon iom da alkoholo denaturigita, laŭ unu el la baptovirinoj tio certigas, ke restu viva la malforta bebo. Li estis ruĝa, sulkvizaĝa, neniel pli bona, ol kia ajn alia bebo en simila situacio. Estis li, kiun oni atendis, kiun la historio elektis. Kio li fariĝos? Kvankam ni jam scias tion, ekscitite ni povas denove akompani lian sorton. Mi estas feliĉa, povante skribi pri li.

Trad.: Jozefo Mátéffy

Gyula ILLYÉS:

LA POPOLO DE LA „PUSZTA"

Mi naskiĝis en provinco, tamen dum longa tempo mi apenaŭ sciis pli multe pri vivo de la vilaĝoj, ol se en urbo mi estus ekvidinta la mondon. La psikon de la kamparanoj mi konis nur laŭ informoj. Mi naskiĝis ja *en pusto*[1], kaj mi restis tie ĝis mia fraŭliĝo.

La vorto *pusto* hungare signifas ne nur la senfinan paŝtejon, la romaneske liberan stepon, prikantitan de Petőfi, kie diskuras fulme kaj brue frapas hufe aroj da ĉevaloj; en Transdanubio tian sencon la pusto tute ne havas, el la simpla kialo, ke stepoj tie *ne* troviĝas. Pusto signifas en Transdanubio domo-grupon, kelkfoje vilaĝe grandan, meze de grandbieno: komplekson el loĝejoj de bienservuloj, staloj, grenejoj, ilar- kaj veturil-tenejoj, kie vivas ne nur unuopaj familioj, sed eĉ cent aŭ ducent. Troviĝas tie ankaŭ lernejo, preĝejo, almenaŭ kapelo, ĝenerale ligita al flanko de kastelo.

Estas do ankaŭ kastelo, meze de belega, grandioza parko kun artefarita lago, tenis-ludejo, fruktoĝardeno, majestaj aleoj, kaj ĉirkaŭata de alta ferbarilo majstre forĝita, eĉ de akvo, memoriganta pri fosaĵo ĉirkaŭ fortikaĵo.

Post la kastelo la plejornama konstruaĵo, foje eĉ pli impona estas la bovostalo. Sekvas laŭvice la domo de la bienintendanto, preskaŭ ĉiuloke ĉirkaŭata — pro nekonata tradicio — de cipresoj kaj abioj. Jam malpli ornamhava estas la loĝejo de la agronomo, kaj des malpli tiu de la ĉefmaŝinisto . . .

. . . Preskaŭ duonon de la kulturitaj kampoj de Hungarlando kultivas la servuloj de la pustoj. Tiu popoltavolo akre distingiĝas de ĉiuj ceteraj laŭ moralo, moro, mondpercepto, eĉ laŭ paŝadmaniero aŭ brakmovo. Flanke kaj fore eĉ de vilaĝoj, ili vivas fermite, en absoluta izoliteco. Ligitaj al devoj tuttagaj, eĉ dimanĉe, ili preskaŭ neniam foriras de la pusto; sed kontaktiĝi kun ili tie, kien la distancoj estas grandaj kaj la vojoj malbonaj, la cirkonstancoj estas specialaj kaj la malkonfido popola tiom profunda — estas entrepreno multe pli malfacila, ol studi ian tribon en Mezafriko. Eĉ la literaturo neglektis ilin ĝis post la unua mondmilito.

Ili vivadas, kaj materiale, kaj spirite, en ia stranga, misa, tamen fortodona komuneco; tiu komuneco pli similas laŭ kelkaj trajtoj la solidarecon de laboristo-grupoj en fabrikoj, ol tiun de la vilaĝoj. Tamen ĝi diferencas ankaŭ de ĉi tiu. Originala, neordinara mondo, ĉe kies anoj ne nur la vorttrezoro, sed eĉ la sonĝoj montrigas unikaj — kio estas ja komprenebla . . .

. . . Vangofrapon la pustano ricevas nur ĝis la 30—35-jara aĝo. Poste jam nur malantaŭe, surnuke aŭ surkole atingas lin frapo, plejofte nur unu. Se pro cirkonstancoj oni tamen devus fronte lin alfrapi, tiam la bato estu — laŭ rutinhavaj spertuloj — rapida kaj inertiga, decida kaj definitiva, kiel post frazo la punkto, por ke rekonsciiĝinte la ulo tuj sentu: estas finite, nenia apelacio! Kontraŭ maljunuloj oni laŭeble nur eviteme uzas la senperan disciplinadon. Post la sesdeka jaro la plej multaj jam pro nura manlevo ekploras. Ne pro timiĝo, sed pro humiligo. Ĝis tiu aĝo ja maturiĝis en ili la scio pri homa digno.

Uzo de vergo, bastono, rajd-vipo ktp. estas laŭeble evitenda super la dudekjara aĝo. Dum la senpere, de-korp-al-korpe donitan batadon ili ĝenerale eltenas subme tiĝeme, kelkfoje eĉ ridete, kvaza ili vidus en ĝi iaspecan rilaton in terhoman; la puno plenumita pe ilo vekas en ili reagon neantaŭvi deblan. Ion similan observis an kaŭ esploristoj de besto-psiĥologic La konduto ne estas influata de l grandeco de la kaŭzita korpa do loro. Tiurilate mi citas el miaj ju naĝaj observoj la vortojn de nov edziĝinta servulo: „perbastone n batu, Sinjoro!" li kriis kun vango abrupte sangruĝiĝintaj, kiam l bienmastro, finínte la sufiĉe daŭ ran frapadon per la malplena dekstra mano, nur kvazaŭ adiaŭant alsvingis mincan bastoneton tena tan en la maldekstra. Infano esta punebla ĉiamaniere kaj per ĉia ajr ilo . . .

. . . Nature, tiuj kutimoj pli malpli nuanciĝas laŭ provincoj. Er Supra-Somogy ĝuste junulojn estas malkonsilinde tuŝi; ili esta malfacile „dreseblaj". En region de O. de sabatvespero ĝis dimanĉ noktomezo estas konsilinde deten sin de manuzado rilate la pustanojn. Kiel mildaj dumsemajne, tie incitemaj kaj ofendemaj ili esta dimanĉe kaj en kelkaj festotagoj ekzemple je Petro-Paŭlo ka Sankta-Stefano; estus interese esplori, kial ĝuste tiam?

La frapoj estas tolerataj preskaŭ ĉie mute; estas proverbo: „Servulo ekvoĉas nure, kiam l'animo lasas lin kure" . . .

. . . La filino de nia tria najbar sin mortigis. La vivenuiĝintaj virservuloj ĝenerale finas la vivon per sinpendigo, la virinoj per salto en puton; alian manieron oni apenaŭ praktikas, severe gardante la tradicion de ia deco. La filino „frekventis" la kastelon. Tial ŝi mortigis sin . . .

. . . Ŝi rompis la kutimon, la ordinaran rutinon; ja neniu povas riproĉi — meditis la bienoficist — ke hieraŭ ĝuste ŝin li vokis a

---

[1]*Pusto:* la hungara „puszta", same prononcenda. Origine: loko de detruita vilaĝo (precipe dum militoj), sed uzata ankaŭ en senco de stepo. Vidu pluan klarigon en la teksto mem.

si (ebrie, por kvietigi sian speciaian voluptemon, kiel oni poste klaĉis); ĉu ne la obeado estas la devo de servuloj ĉiukaze? Tiu ribelo estis ne komprenebla kaj por li, kaj por la servuloj. Pro simila afero oni ja tute ne faras tian misagon!

Tamen ŝi, per sia morto, iĝis subite individuo, eliĝis el la komuneco. Per sia nerompebla muteco ŝi kolerigis kontraŭ si eĉ la patron; la maljunulo staris kun la ĉapelo en mano antaŭ la oficisto, mire-indigne levis kaj faligis siajn brakojn, kvazaŭ ekskuzante sin, pro la peko de sia filino. En mia fantazio ŝi, tiu vundŝirita, pala, morta vizaĝo iĝis poste la anĝelo de spito kaj ribelo...

...Mi aŭskultis de la bien-oficistoj fakspertajn raportojn pri kutimoj de diversaj regionoj. Pri diferencoj inter pejzaĝoj sablaj kaj kompakt-grundaj, kiuj manifestiĝas ankaŭ en la moroj. Kie la grundo de la pusto estas argila, do kie la sarkado bezonas tre grandan forton, tie la popolo estas silentema kaj malserena, vespere emas rapide enlitiĝi. Sed kie la grundo estas sabla, do la sarkilo tiriĝas preskaŭ de si mem, tie antaŭnokte senfine daŭras petolado kaj ĉio, kio kutime kunokazas.

Poste mi aŭdis pri la delikata psiko Transdanubia; tie la popolo gardas ankoraŭ sian praan naturon (*komprenu*, ke en iliaj buŝoj „praa" signifas ja ĉiam ian servistan, bestecan, por homa menso indignigan), tute kontraŭe al la pustanoj de la Supra-Transtisza. Kvankam tiuj eĉ ne kapablas inde vesti siajn virinojn, tamen ili verŝus sangon, eĉ de la mastraro, se iu nur okulojn levus sur ilin. Poste eĉ pri kutimo-detaloj. Ekzemple, ke en Fejér la knabinoj senvestigas sin, sed ĉi tie ni vane petegas demeti eĉ la antaŭtukon, ja ili tiras ĝin survizaĝen, tiom ĉastaj ili estas.

Tuj la sekvan tagon mi spertis la malon. En ĉambro de iu oficisto mi legis sur divano, kiam envenis juna sezonlaboristino. Ŝi rifuzis ĉe draŝado forporti la malpuraĵojn, dirante, ke ŝia ŝultro doloras. Sed tio okazis jam antaŭ kelkaj tagoj, kaj ŝi ne konjektis la kaŭzon de la envoko. La amiko, ŝarĝita ankaŭ pri sanitaraj devoj, por prijuĝi, kiu malkapablas labori, kiun lasi iri en la vilaĝon al kuracisto, ĵetis la vorton al ŝi: „Demetu la ĉemizon!", kaj pro ia tasko forlasis la ĉambron. La knabino ekrigardis min, poste, kvazaŭ subite kompreninte ion, ruĝiĝis, kaj kiam mi levis mian vizaĝon de sur la libro, ŝi staris jam antaŭ mi tute nuda...

...Al iu pusto ŝaftondistoj venis kutime el la ebenaĵa kamparana urbo Sz. Por iu oficisto ĉiujare ili devis kunporti „lernantinon", tre belan knabinon, sendifektan; la rakontantoj nur pene konvinkis eĉ min, ke okazas ankoraŭ sur la tero fefabeloj kun virgulino kaj drako, sed sen liberiganta heroo...

Trad.: Ervin *FENYVESI*

1975: Internacia Finn-Ugra Kongreso en Budapest

Bone mi memoras, ke antaŭ la milito estis Finn-Ugra Kongreso en la Scienca Akademio kaj du viglaj esperantistoj: Julio Lukács kaj poŝtinspektoro Stefano Zöldy kun verdstelaj brakrubandoj promenis antaŭ la kongresejo por atentigi la fremdajn gastojn, ke Esperanto estas preta por servi al ili. Jen imitinda sinofera servo! Ĉu estas nun tiaj sindonaj esperantistoj ĉe similaj okazoj, en foiroj kaj ekspozicioj? Mi jam ne memoras, ĉu estis esperantisto inter niaj fratnacioj: finnoj kaj estonoj.

Sed nun espereble estos, precipe se oni antaŭe atentigos la kongresanojn, ke ili studu Esperanton: se ili ne povas inter si uzi iun el la finn-ugraj lingvoj, oni uzu la neŭtralan lingvon! Ni ja havas nun tiajn eminentajn lingvistojn, kiel la hungara akademiano, profesoro Géza Bárczi, la hungara lingvoscienculino, vivanta en Moskvo, Klara Maitinsky kaj la estona lingvisto, membro de la Akademio de Esperanto prof. P. Ariste en Tartu. Mi devas mencii ankaŭ iun alian el niaj akademianoj, nian maljunan veteranan amikon magistron Vilho Setäläen Helsinki. Espereble ili ĉiuj bonsane vivos en 1975 kaj vizitos la kongreson.

Ĝi estos la kvara tia kongreso. La unua estis en 1960 por lingvoscienco en Budapest, la dua en 1965 en Helsinki kaj la tria en 1970 en Tallinn. Interesa propono estas, ke tiu kongreso okupiĝu krom lingvistiko ankaŭ pri la etnografio, folkloro, literaturo kaj arkeologio de la finn-ugraj popoloj, pri la rezultoj de la plej novaj fosaĵoj de antikvaĵoj. Interesan prelegon pretigas hungara universitata profesoro Gyula László pri teorio de du landokupoj de hungaroj en la nuna regiono. Laŭ nia historio la patruj-konkero okazis en la naŭa jarcento. Sed laŭ prof. László ĝi estis la dua ondo de la hungaroj, kiuj trapasis la Karpatojn. La unua estis tiu de la varkonoj multe antaŭ la naŭa jarcento. Nome ne ekzistas varkona lingvo kaj tiuj konkerintoj devus esti ankaŭ iuj grupoj de hungaroj kaj parolis hungare!

Por tiu kongreso oni proponos la aperigon de multaj sciencaj kaj literaturaj verkoj. Inter ili la historion de la hungara—finnugristika historio kaj ties biografio, la konigon de la finn-ugraj popoloj kaj lingvoj, literaturan antologion el la literaturo de la malgrandaj finn-ugraj popoloj, la arkeologion finnugran kaj ankaŭ la historion de la finna literaturo.

P. Balkányi

De tago al tago la svisa publiko aplaŭdas la bilde montritajn du hungarajn knabinojn Maria Szekeres kaj Ottilia Szénássy, kiuj en la Zürich-a prezentado de la cirko STEY, fondita en 1437, per sia spirhaltiga produkcio en 10-metra alto, sen reto, vekas miron kaj admiron, sub la nomo Du „Violinoj".

En preskaŭ ĉiu parto de la mondo oni memoras pri la 150-a datreveno de la naskiĝo de *Sándor Petőfi.* Per la kunlaboro de diversaj kulturaj organizaĵoj en pli ol kvardek landoj oni aranĝas ekspozicion el 200 negranddimensiaj pentraĵoj, krome kvin reprezentajn migrajn ekspoziciojn, en kiuj, helpe de fotoj, libroj, gramofonaj diskoj, oni konigas la vivon, laboron, arton de Petőfi kaj la esencon de lia revolucieco. En *Finnlando* ĉi-jare proksimume 3 500 lernejoj organizos Petőfi-festojn. En januaro en Berlino kaj en Vieno malfermiĝis reprezentaj ekspozicioj. Petőfi-vespero estis ankaŭ en la Burgenlanda *Oberwald.* Petőfi-ekspozicio malfermiĝis en *Varsovio,* en marto en *Dortmund* kaj *Regensburg* kaj en aprilo en *Zagrebo.* Apartan reprezentan ekspozicion ni sendis al *Moskvo.* Ĉi-okaze oni faris literaturan memorvesperon en la centra domo de la sovetaj verkistoj, kie en la lingvoj de la sovetaj popoloj oni interpretis la verkojn de la granda revolucia poeto. En Quito, ĉefurbo de *Ekvadoro* kaj en *Milano* oni starigos la bronzstatuon de Petőfi, kreaĵon de *Béni Ferenczy.* Sur la Petőfi-placo de la *Bolivia* La Paz oni inaŭguros la statuon de la poeto faritan de Tamás Vigh. En *Sofio* oni lokigos memortabulon, kiun faris Pál Pátzay. En *Weimar* de la 14-a aprilo ĝis la fino de julio daŭros la rememoradoj. En *Prago* kaj en *Bukareŝto* aŭtune okazos Petőfi-rememoradoj.

* * *

panoramo

panoramo

Aperos traduko-kolekto el la poemoj de Petőfi *en la lingvoj de la Hungarlande loĝantaj nehungaraj gentoj: germane, serbokroate, slovake. La libro enhavos la respektivajn poemojn ankaŭ Esperante en la traduko de* K. Kalocsay. *Pri la eldono zorgas la Popolkleriga Informejo de departemento Pest.*

* * *

Niajn evoluantajn sciencajn internaciajn interrilatojn grandmezure helpis la *organizaja reformo* farita en la *Hungara Scienca Akademio:* povis elformiĝi la decidebleco en la internaciaj afer-aranĝoj kaj la akordigita direktado de la korporacia kaj faka administrado. Ties rezultoj: la estigitaj, difinitaj laborplanaj interkonsentoj kun la sciencaj akademioj de la socialistaj landoj kaj kun la esplorcentroj de la okcidentaj landoj. Tiamaniere nia Akademio kunlaboras kun eksterlandaj akademioj pri pli ol ducent komunaj esplortemoj.

* * *

Pretiĝis la bilanco de la Centra Statistika Oficejo *pri la lastjara* fremdultrafiko: *la rezultoj montris rekordon. Laŭ ĝi ses milionoj kvarcent mil personoj vizitis nian landon. Per tricent dudek mil pli ol antaŭ unu jaro. La plimulto de la gastoj alvenis el la socialistaj landoj, sed ankaŭ el la kapitalistaj landoj venis en nian landon per centmil pli da turistoj ol en 1971, entute 1 miliono. Al la pliviglîĝanta trafiko de niaj limtranspasejoj kontribuis ankaŭ la hungaroj: lastjare unu miliono kvarcent mil turistoj vojaĝis eksterlanden, per tricent kvindek mil pli ol en 1971. Por plia kreskigo de la trafiko ĉi-jare IBUSZ proponas al la interesiĝantoj ankoraŭ pli da eblaĵoj. Ekzemple estas novaĵo la* Balkana vojaĝo *prezentanta kvar landojn, la Eŭropa rondvojaĝo inter* Kopenhago—Londono—Hamburgo—Munkeno, *aŭ la refreŝiĝo en* Malgranda Fatro. *En la organizado de la oficejo de IBUSZ la pensiuloj kun signifaj favoraĵoj povas vojaĝi al* Aŭstrio, Francio, Hispanio *aŭ* Greklando, *kaj por la turistoj kun aŭto oni organizas eĉ dek specojn de vojlinioj. Malmultekostan marbordan refreŝiĝon promesas la kvintaga ripozado en* Opatija.

* * *

La Akademia Eldonejo aperigis verkon de akademiano *Lajos Jánossy,* titolitan *Relativec-teorio surbaze de la fizika realo.* La verko, kiu en angla lingvo jam vekis grandan interesiĝon, ampleksas kaj la specialan, kaj la ĝeneralan relativecteorion. Ĝi prezentas la kutiman matematikan formalismon ellaboritan de Einstein kaj aliaj. Interesaĵo de la verko estas, ke ĝi kondukas la leganton en la relativec-teorion sin apogante sur eksperimentaj rezultoj.

* * *

Post la Viena „Naturhistorisches Museum" sukcese oni prezentis en Munkeno *la ekspozicion de la* Hódmezővásárhely-a Muzeo *János Tornya; ĝi vekis inde grandan rekonon kaj sensacion. La kvarmil-sepmil-jaraj idoloj — praepokaj ceramikaj diostatuetoj — kaj la ceramikaj vazoj kaj objektoj iam uzataj ĉe kultaj ceremonioj estas de elstara valoro, ili estas ja la plej okcidentaj memoraĵoj de praepoka Malgrand-Azia kulturo. Ankaŭ ĉi-tiuj plej malproksimen venintaj objektoj de la Anatolia kultur-rondo estas pruvoj pri tio, ke la agrokulturo kaj bestobredado sur tiu ĉi vojo alvenis kaj disvastiĝis en Eŭropo.*

* * *

panoramo

La Instituto de Kulturaj Interrilatoj *ĉi-jare organizas proksimume cent ekspoziciojn en nia lando por prezenti eksterlandajn artistojn aŭ artojn de aliaj popoloj. La* Belarta Muzeo *ekspozicias ĉefverkojn de malnovaj rusaj artistoj. IKI prezentos famajn italajn pentraĵojn de la* Ermitage *en* Leningrad. *Reprezenta ekspozicio de* slovakaj *belartistoj, ekspozicio de* ĉehoslovakaj *fotoartistoj, ekspozicio de kreaĵoj de* bulgaraj *pentristoj, kiujn ili faris en nia lando, prezento de la kolektaĵo de la* etnografia muzeo de Zagrebo, *gastekspozicio de la muzeo en* Lodz *kaj la ekspozicio de la* polaj belartistoj *rolas inter aliaj en la planoj. En la* Artgalerio *oni aranĝos la kolektan ekspozicion de* Fritz Cremer, *skulpt-artisto el la Germana Demokratia Respubliko. El* Rumanio *alvenos la kolektaĵo de la pentristo* Imre Nagy *kaj oni ekspozicios ĝin en la* Ernst-Muzeo. *La* Nacia Galerio *prezentos la materialon de la* Belarta Muzeo *en* Cluj. *La ekspozicion de la Aŭstria skulpt-artisto* Fritz Wotruba *oni aranĝos en la Artgalerio, la ekspozicion de* la angla portret-pentrarto *en la Belarta Muzeo, kaj la prezenton de la nuna* belga belarto *oni povos vidi en la Ernst-Muzeo. En la Nacia Muzeo oni prezentos la trezoraĵojn de* Cipro.

* * *

En la pasinta jaro IBUSZ aranĝis preskaŭ 300 landajn kaj internaciajn kongresojn, sciencajn konferencojn, interkonsiliĝojn, aliajn aranĝaĵojn. Ĉi-jare oni plivastigos la fremdultrafikajn programojn de la aranĝaĵoj; inter ili ankaŭ plu rolos la koncertoj farataj en la gotika ĉambrego de la fortikaĵo de Buda. Novaĵo estos la cigana folklor-prezentado aranĝota en la Vörösmarty-vinpremejo en *Velence*, la „Kelo-festeno", kaj la programo de la ensemblo el *Galgamácsa* stampita per la nomo de *Juli Vankó Dudásedza*. Ekde majo denove estos aranĝata la favorata Guláŝ-festeno, kiun en 1972 partoprenis 40 mil eksterlandanoj.

* * *

Refreŝigejo de Landa Konsilio de Sindikatoj (SZOT) en Hajdúszoboszló, fama pri sia termal-akva banejo, kie pluraj miloj da laboruloj jare refreŝiĝas kaj kuraciĝas.



La haltejo Placo Batthyány de la Bpeŝta METRO. Aliĝa loko de urbekstera tramlinio.

La regula konsumado de la multspecaj *kuracteoj* kaj de la siropoj enhavantaj multajn vitaminojn helpas nian organismon en la prevento kaj venko de diversaj malsanoj, kaj povas malpliigi la nocajn sekvaĵojn de la troa medikament-konsumado. La entrepreno „Herbaria" liveras en la merkaton proksimume 180-specajn kuracteojn. La altan kuracvaloron de la kuracplantoj oni jam konas delonge. Nia lando estas riĉa je diversaj kuracplantoj. La konsumantoj povas aĉeti en fakvendejoj la diversajn teo-miksaĵojn, el kiuj estas ĝenerale konataj la tilio-, kamomilo-, eglanterifrukto-, aŭ pipromento-teoj, kiuj estas bonaj rimedoj por hejma kuracado de negravaj malvarmumaj malsanoj aŭ de maldigesto. La kuracplantojn oni alte taksas ankaŭ en eksterlando. La eksportado de la Kooperativa Entrepreno Herbaria direktiĝanta al la kapitalistaj landoj estis en la pasinta jaro per kvincent mil dolaroj pli granda ol en 1971.

* * *

La Entrepreno de Internacia Komerco Metrimpex *en decembro de 1972 subskribis kontrakton de 15 milionoj da dolaroj kun la instruo-ministerio de* Peruo, *laŭ kiu oni ekspedos laboratoriojn por 21 ŝtataj universitatoj kaj por la bazgrada instruado de Peruo, krome ankaŭ diversajn instalaĵojn por metilernejoj.*

* * *

La valutotrafiko de la turismo direktiĝanta de *Britanio* al Hungario kreskis de sescent mil usonaj dolaroj al naŭcent mil. El la gigantaj entreprenoj, kiuj vojaĝiĝas dekmilojn da anglaj turistoj, la entreprenoj „Horizon" kaj „Globe" nun aliĝis unue al la organizo de la hungara fremdultrafiko, kaj kune kun la „Danube Travel" helpis la hungarlandan vojaĝon de preskaŭ dudek mil angloj. El Britanio ĉiujare ses milionoj da homoj vojaĝas eksterlanden; konsidere de la kvociento de la loĝantar-nombro tio estas malpli ol kiom estas la nombro de hungaroj mondvizitantaj. Granda estas la interesiĝo de la angloj pri la montpejzaĝo de *Tokaj*, pri *Balatono*, pri la *ekskursoj sur ĉevaloj* kaj pri la *kurac-refreŝiĝoj*. La vojaĝkontoroj ekirigas al Hungario jare plurajn apartajn aviadilojn.

* * *

Tridekkvar Aŭstraliaj *muzikprofesoroj alvenis en nian landon por studi la hungaran muzikinstruadon. Ili faris viziton en la „Muzikarta Ĉeflernejo Ferenc Liszt" kaj en aliaj muzikinstruaj institucioj.*

* * *

La filmistoj de Hollywood antaŭnelonge festis la centan naskiĝtagon de la hungardevena *Adolf Zukor*, plej aĝa vivanta pioniro de la filmado. Zukor fondis en 1917 la fama filmstudion „Paramount" kiun li forvendis en 1967, sed ankaŭ plu restis ĝia honora prezidanto.

panoramo

Zoltán Molnár:

BÖCE

— Ĉu vi estos mia fratino? — demandis Böce, dika knabeto, sidanta milde sur la ŝtuparo.

La knabineto, kiu ĵus kuraĝe kuris en solo supren de la pordego, nun surpriziĝis. Ŝi enŝovis la fingron en la buŝon kaj senvorte gapis al la knabeto.

La ferpordego grincis, ĝi ne povis tute enfermiĝi, ĉar oni enmetis saketojn el la strato.

— Oni kunportis mian pasintjaran fratinon. Sed mia panjo diris, ke estos ankaŭ alia, nur finiĝu la eksedziniĝo.

La blondulineto suĉis sian fingron.

— Ĉu ankaŭ ĉe vi okazis tio?

Li vidis, ke ŝi malfacile ekparolas, ne tordis ŝin per demandoj, malrapide leviĝis. Li estis deca knabeto, li senpolvigis sian postaĵon; sed nur po unufoje surbatis dekstre kaj maldekstre sian postaĵeton.

La nova fratineto retiriĝis unu paŝon. Ŝi hezitis, ĉu ŝi ne elprenu la fingron el sia buŝo. Poste ŝi lasis ĝin tie; Böce ne alproksimiĝis.

— Ŝi havis du pupojn, kies nomo estas Rosino, unu el ili mi kaŝis por vi, mi nur devas ĝin serĉi.

Ĉi tio vere estis stranga; la knabineto ne pensis pri tio, ke ŝi havos ĉi tie fraton, kiu ŝin atendos. Ke li kaŝis ion por ŝi. Ŝi ne povis tute percepti.

Estis arboj, greso, arbustoj, birdoj, Tial ŝi supren-kuris kaj nun denove komencis atenti pri tiuj.

— Ĉi tiuj estas turdoj — Böce sekvis ŝian rigardon. Ankaŭ li ekiris al la ĝardeno kaj donis la manon.

La knabineto ne kaptis ĝin, sed faris kelkajn paŝojn post li. Fine ŝi ankaŭ elprenis la fingron el sia buŝo. Ŝi retrorigardis al la pordego.

— Patreto.

Böce aprecis. Li haltis.

Iomete li ankaŭ rigardis al tiu direkto. Du ĉaroj estis tie, unu el ili ĝuste tiam ekiris. La ferpordo ankoraŭ grincis.

Li ekvidis la altan viron, kiu estos lia patro. La viro demetis grandan saketon, leviĝis kaj ridetante al li mansignis.

Ili jam renkontiĝis, li ne interesis la knabeton; ĉi tiu pensis pri tio, ke li devus mansigni resalute, sed li estis pigra; tamen el ĝentileco li iomete levis la manon.

— Mia nomo estas Böce, ĉar iom mi estas dika. Pro la multaj ĉokoladoj, Via nomo estos Cili, ĉu bone?!

— Ne! — kapneis la knabino. — Tute ne. — kaj ŝi severe kuntiris la brovojn.

Böce ne devigis ŝin, sed li ankaŭ ne demandis, kian nomon ŝi havas.

— Mi havas ankaŭ pafilon — li diris ankoraŭ —, sed mi ne kutimas per ĝi pafadi.

Du turdoj suprenflugis, la knabineto rigardis ilin. Ŝi levis la dekstran manon, hezite tenis ĝin en la aero, sed ne ŝovis la fingron en la buŝon.

Tamen frato estus estinta pli bona, pensis Böce.

Li longe rigardis, kiel venas supren el la pordego la virino kaj la viro, penante pri porto.

Nu, eble sekvontjare.

Li estis pacienca.

VOĈO

— Vere, mia patro — diris Baba per sia infaneska ĉarma, flata voĉo —, li estas tiel brava knabo. Li akompanis min ankaŭ al aborta operacio.

La patro jam alkutimiĝis al strangaj interparoloj kun la filino, sed tio nun estis tro stranga.

Li iomete senraspigis la gorĝon, kiel en konferenco, kiam li devas klopodi pri la formulado.

— Ĉu vi ne pensas pri tio, filino, ke . . .

— Ĉu vi kredas, ke la nuntempaj knaboj havas tiel multe da delikateco? Tre malmultaj el ili havus inklinon por tiaĵo.

— Estas kortuŝe — ĝemis la patro — estas kortuŝe, ke via Ladiĉjo . . .

— Adalberto. Mi jam diris, Ladiĉjo estis pli frue.

— Do strikte, tiu Adalberto. Estas kortuŝe, emocie ĝis larmoj. Vere eĉ, ventron de diosinjoro pri lia kavalireco!

Tiel li frapis pugne sur la tablon, kiel patro el la deknaŭa jarcento. Ankaŭ li mem rimarkis, ke tio sukcesis tro granda, tial li aldonis pli trankvile: — La modernan diosinjoron!

— Sed patro . . . — tiel malbone tuŝis tiu voĉo filinon Baba, ke — kvankam mallaŭte, obtuze —, ŝi ploretis.

— Nu.

Ŝi apenaŭ trovis la naztukon.

— Lasu tion, filineto . . . finu do, tiel ne eblas . . .

El la ploreto, kvankam ŝi evidente klopodis sin disciplini, komencis elformiĝi tute vera ploro.

— La pensoj haltas en la kapo.

Ŝi tiel sincere ploris, ke oni devis ŝin ekkompati.

Li iom karesis ŝiajn harojn, ke li povu ŝin trankviligi. Tiam ŝi falis al lia ŝultro. En la deknaŭa jarcento ĉu ne, ŝi plorante estus falinta sur la bruston de la patro, sed tion jam ŝi ne povis fari, ĉar

ŝi estis la pli alta. Sed ploregi, ion ŝi faris. Ne histerie, nur kun mezuro.

Sur la lango de la patro estis a vortoj, ke tio ne decas al moderna knabino, sed ankoraŭ en konvena tempo venis la penso, ke eĉ unu vorton ne pri moderneco.

— Nu, estas bone, mia filino, vi scias, ke kun mi vere eblas priparoli la aferojn. Sidiĝu bele, kaj...

Baba ĉesigis la ploregon, kaj bele sidiĝis. Per sia poŝtuko ŝi delikate fortrinkigis la larmojn. Ŝi viŝis ankaŭ sian nazeton. Sed paroli ŝi ne komencis. Ŝi atendis.

— Mallonge, mi scias, ke la vivo aliformiĝis, kaj estas tute alia, ol en nia tempo. Ke multrilate... pli libera... pli simpla...

Intertempe estiĝis al li bona prokrasta ideeto.

— Ni sidiĝu, se tiel diri, triope kun via patrino... kaj saĝe, sincere... Eble la postan semajnon.

— Mi dankas, patro. Mi sciis, ke vi min komprenas. Fine, — ŝi diris, kaj kvazaŭ en tiu vorto f i n e estus iomete da riproĉo.

Ŝi stariĝis, remetis la poŝtukon, donis al li fruntkiseton, kaj ankaŭ tuj ekiris.

La patro timiĝis, li sentis, ke okazas ne riparebla miskompreno; ke Baba ne tiel perceptas la vortojn, kiel... Sed jam...

— Baba!

— Salut', patro!

Li restis tie en solo.

Ja efektive, se tiel diri... Troviĝas, kiu eĉ ne diras, nur post la geedziĝo. Baba ankoraŭ estas tute normala. Modesta. Ankoraŭ en multaj aferoj ŝi preskaŭ estas eĉ konservativa.

Tradukis: SZILÁRD *BÁLINT*

La centjara Népszava (Popolvoĉo)

En la historio de la hungara preso okazas unuafoje, ke landa ĵurnalo ĝisvivas sian centjaran jubileon. Estas historia justofaro, ke ĉi tiu ĵurnalo estas *Népszava,* la unua ĵurnalo de la hungara laborista movado, legala opozicia organo frapita en la feŭdala-kapitalisma Hungarlando per la plej multaj persekutado, presprocesoj, cenzuro kaj malpermeso. Ĝi naskiĝis kiel gazeto de la hungara socialdemokratio. Post la liberiĝo, kiam la socialdemokratia kaj komunisma partioj unuiĝis, „Népszava" faciĝis centra ĵurnalo de la sindikata movado.

La paseo de „Népszava" strikte interplektiĝas kun la unua socialisma gazeto „Laborista Semajna Kroniko", eldonita de la „Ĝenerala Laborista Unio"; ĝia unua numero aperis la 5-an de januaro 1873. Ĉar parto de la tiama laboristaro estis germanlingva, oni ellonis ĝin ankaŭ germane kun la titolo „Arbeiter Wochen-Chronic"; ĉi tiun varianton redaktis *Leo Frankel,* amiko kaj kunlaboranto de Marx kaj Engels, unu el la eltaraj gvidantoj de la Komuno de Parizo. *Ĉu tiuj du gazetoj estis la praulo kaj jur-antaŭulo de „Népszava".*

„Népszava" mem estiĝis en 1877, kiel gazeto de alia laborista grupiĝo. Sed, sekve de la unuiĝ-klopoloj de la laboristaro, en 1880, sub la gvido de Leo Frankel, formiĝis la „Hungarlanda Ĝenerala Laboristpartio", kaj post jardeko, reorganiziĝinte, alprenis la nomon „Hungarlanda Socialdemokratia Partio". Ĉi tiu partio igis la gazeton „Népszava" sia centra gazeto en 1880 kaj deklaris, ke la gazeto daŭrigos la linion bataleman de la „Laborista Semajna Kroniko" kaj tial transprenos ankaŭ ties jarnumeradon.

Pro sia batalo por la ekonomiaj interesoj, kultura kaj politika edukado de la laboristoj, la gazeto kaj ĝiaj kunlaborantoj estis multe premataj de polico kaj tribunalo, plurfoje la gazeto devis ŝanĝi ankaŭ sian nomon. Tamen ĝi plifortiĝis kun la progreso de la laborista movado kaj en 1905 ĝi fariĝis definitive ĉiutaga gazeto.

Inter la du mondmilitoj la maldekstremaj socialdemokrataj kaj la komunistaj ĵurnalistoj, laborantaj en ĝia redaktejo, batalis kontraŭ la burĝa reakcio kaj la faŝismo. Dum la dua mondmilito „Népszava" kune kun la komunistoj estis maturiganta la antifaŝisman popolfronton.

Post la liberiĝo en 1945, „Népszava", kiel ĵurnalo de la sindikatoj, kun la riĉaj spertoj de sia movada paseo, daŭrigis sian batalon por la levo de la laborista klaso. Sed jam inter la radike novaj kaj multe pli favoraj cirkonstancoj de la socialisma konstruado.

La historio de „Népszava" estas ankaŭ la historio de 100 ĵaroj de la hungara laborista movado. Ĝuste tial estas agrabla sento por mi, ke en la lastaj 25 jaroj de ĉi tiu 100-jara gazeto jam ankaŭ mi povis esti ĝia kunlaboranto, kaj ankaŭ nun tie ĉi mi povas servi la celojn de la sindikata movado. Kaj pri miaj plurfojaj artikoloj pri Eo ankaŭ la movadon de la internacia lingvo.

En la historio de la hungara Ea movado, „Népszava" ĉiam havis pozitivan rolon. Ĝi estis la unua en la hungara preso, kiu subtenis la aferon de Eo kaj ĝin popularigis per multnombraj artikoloj.

La nuna hungara E-movado havas la „Landan Konsilion de la Sindikatoj" kiel sian ĉefpatronon. Kompreneble do, ke ĝia centra pres-organo ankaŭ plue subtenas Eon, publikigas plej multe pri la internacia lingvo. En ĝi aperis la signifa iniciato vekinta ankaŭ internacian eĥon: „Nefermita letero de hungaraj olimpikaj ĉampionoj kaj sportistoj al la Internacia Olimpika Komitato" kun subskribo de 26 renomaj sportistoj. Ĝi pretiĝis en la intereso de tio, ke Eo povu fariĝi lingva faciligo ĉe la internaciaj renkontiĝoj de la sportistoj, helpanto de ilia homa interkompreniĝo. Eĉ se ĉi tiu celo ankoraŭ ne povis esti atingita, ĉi tiu nefermita letero tamen proksimigis Eon al la tendaro de la sportistoj.

Estas espereble, ke „Népszava", enpaŝinta jam en sian duan jarcenton, daŭrigos ankaŭ en la afero de la internacia lingvo siajn malnovajn internaciismajn tradiciojn.

Imre Szenes

VIZITO EN LA „LIBROVENDEJO DE HUNGARAJ VERKISTOJ"



En la dumiljara urbo Pécs ne nur la antikvaj ŝtonoj, elfosaĵoj, malnovaj konstruaĵoj, artaĵoj atentigas la vizitantojn pri la kulturo, sed ankaŭ la historio prezentas signifajn kultureventojn en la sudhungarlanda urbo. En tiu ĉi iama romia kulturcentro la hungara reĝo Ludoviko la Granda fondis universitaton en 1367, ĉi tie vivis kaj verkis la humanista poeto, episkopo Janus Pannonius. La mez- kaj altlernejoj de Pécs edukis kaj emisiis multajn elstarulojn de la hungara kultura vivo.

Pri la nuntempa vigla kulturvivo pruvas, krom la plimultiĝintaj lernejoj, kulturaj institutoj, bibliotekoj, dise en la urbo diversaj librovendejoj ofertantaj la plej freŝajn, aktualajn verkojn de la hungara kaj monda literaturo. En preskaŭ ĉiu librovendejo de Pécs troviĝas libroj en la internacia lingvo, tamen ni vizitu la *„Librovendejon de Hungaraj Verkistoj"* ĉe la Entrepreno „Klera Popolo". Por la vizitintoj de Pécs ne estas necese prezenti ĝian gvidantinon Margit Siklósi, kiu helpeme akceptas la interesiĝantojn.

Tabuleto ĉe la enirejo de la eleganta librovendejo anoncas „Esperanto parolata". Eleganta, tamen intima, amika atmosfero akceptas la enirantojn. Impone riĉaj librobretoj, delikate aranĝitaj plantaĵoj preskaŭ devigas senti, ke ĉi tie oni trovas multe pli ol aĉeteblon. Subkonscie oni rifuzas la nomon vendejo en tiu ĉi ĉambrego konstante vizitata, kie ĝentilaj, mallaŭtparolaj vendistinoj, kiel sinjorinoj de iamaj literaturaj salonoj, demandas pri la deziro, interesiĝo de la alvenintoj, parolas pri la literaturo.

En modernaj foteloj ni eksidas kaj kun la ĉiam servopreta ĉefino ni paroladas pri la funkciado de la librovendejo situanta en la plej frekventata parto de la urbocentro.

— Kion signifas ĉi tiu librovendejo en la kultura vivo de Pécs?

— Ĉi tie ni ne nur vendas librojn, sed ni informas la gastojn alvenantajn. Al gastoj ne havantaj difinitan celon, esplorinte ilian intereson, guston, ni proponas verkojn, direktas ilin al la valoraj verkoj. Tre volonte akceptitaj regulaj gastoj estas ĉe ni instruistoj, profesoroj, direktoroj de kulturdomoj, kiuj ofte ĉi tie renkontiĝante ŝanĝas opiniojn pri verkoj, verkistoj.

— Kiacele nun tiu fraŭlino kovras stokon da libroj per celofano?

— Ĉiutage la novajn sendaĵojn ni prezentas sur speciala librotablo en tia kovrilo. Jen inter la hodiaŭaj troviĝas poemaro, romanoj, biologiaj, geometriaj, porĉasistaj faklibroj kaj verketoj por infanoj.

— Kiaj libroj estas aĉeteblaj ĉi tie?

— Ĉiuj libroj eldonitaj en hungara lingvo ne nur en Hungario, sed ankaŭ en Jugoslavio, Rumanio, Ĉeĥoslovakio. La ĉefa profilo de nia vendejo estas provizadi la legantaron per la verkoj de la hungara literaturo, sed konstanta sekcio estas disponita ankaŭ por la mondliteraturo. Nia vendejo klopodas prezenti ne nur la verkojn, sed foje-foje ankaŭ persone la novajn hungarajn verkistojn, poetojn. Dum primara libroprezentado ofte la verkisto ĉi tie donas informojn al la interesiĝanta regula legantaro. Specialajn solenaĵojn signifas en la vivo de la librovendejo la persona dediĉado de verkistoj volonte alvenintaj je tiaj eventoj. Sed mi ne povas preterlasi la informon pri la verkistoj de Pécs, kies verkoj en la lasta jaro sinsekve aperis, anoncante ke ankaŭ la urbo Pécs ĉiam kontribuas al la evoluo de la hungara literaturo. Kaj jen kuriozaĵo: la plej eminenta tradukisto de la poezio de Janus Pannonius estas ĝuste la malfrua posteulo, samurbano Győző Csorba, nuntempa poeto de Pécs.

Kun nekaŝata fiereco mi aŭskultas la detalan informadon kaj kontentiĝe miaj okuloj ĉirkaŭrigardas. Super la plenŝtopitaj librobretoj pentraĵoj altiras la atenton. La ĉefino ridetante klarigas ankaŭ pri tio.

— Al la funkcioj de tiu ĉi magazeno apartenas konigi ankaŭ novajn pentristojn de Pécs, kies pentraĵoj ĝis nun ne atingis ekspozicion. Interesa ekscita tasko estas helpi junajn, ankoraŭ ne konatajn artistojn, prezenti ilin ankaŭ al tiu publiko, kiu ne vizitas ekspozicion de pentraĵoj.

Post tiom da interesaĵo tamen mi ne volas adiaŭi antaŭ ol esti informita pri la vendado de Esperanto-libroj.

— En nia librovendejo estas aĉeteblaj fremdlingvaj lernolibroj kaj vortaroj, inter ili ankaŭ Esperantaj. Aliajn fremdlingvajn verkojn je la deziro de la aĉetanto ni havigas de Fremdlingva Librovendejo, kie oni povas elektadi ankaŭ el pluraj Esperanto-verkoj.

E. Pallós



500 jara estas la hungara libropresado

500 éves a magyar könyvnyomtatás

Rekomendo de libroj el Pécs

SZCZYPIORSKI: SUB LA NOBLA ĈEVALO	Ft-oj	12,—
FABELOJ DE ANDERSEN	„	96,—
BALÁZS: SEP REĜIDOJ	„	28,—
REYMONT: LA LASTA	„	5,—
BAGHY: KOLOROJ	„	27,50
KUN: ONKLO HO	„	24,50
JANIKOVSZKY: ĈU ANKAŬ VI SCIAS	„	32,—
MADÁCH: LA TRAGEDIO DE L HOMO	„	32,—
PETŐFI: LIBERO KAJ AMO	„	42,—
BAGHY: ESZPERANTÓ NYELVKÖNY	„	21,—
SZERDAHELYI: ESZPERANTÓ NYELVKÖNYV (Esperanto 1)	„	21,—
KONOPNICKA: MIA POŜHORLOĜO LA FUMO	„	14,50
BRANDYS: KIEL ESTI AMATA?	„	14,50
PRUS: LA FARAONO	„	130,—

Tiuj libroj estas mendeblaj ĉe
MAGYAR ÍRÓK KÖNYVESBOLTJA
Librovendejo de hungaraj verkistoj
H 7621 Pécs Kossuth Lajos u. 5.
Művelt Nép Könyvterjesztő Vállalat — Librovenda Entreprenro „Klera Popolo"

Hungaraj ĥoroj en eksterlando

Estas certe, ke sur la tereno de la ĥora kulturo Hungario staras en la unua vico de la internacia muzika vivo. Ĉi tion pruvas antaŭ ĉio, ke en multaj internaciaj konkursoj la hungaraj ĥoroj gajnas la plej altajn premiojn.

Interesa estis certe la konkurso de la Brita Radio Asocio (BBC) sub la titolo „Let People Sing!" (Kantu la popolo). En ĉi tiu konkurso gajnis la unuan premion en la kategorio „gejunuloj" la ĥoro de la Budapeŝta gimnazio „Veres Pálné" sub gvidado de *Gábor Ugrin.*

La tradiciohava ĥoro„ Vándor Sándor" kun sia dirigento *László Révész* gajnis eĉ du unuajn premiojn en la pasinta jaro: ĉe la konkurso en Montreux la premion de la publiko kaj alian unuan premion en Spittal (Aŭstrio) en la kategorio „folkloro".

En Tours (Francio) la sindikata ĉambro-ĥoro „Szilágyi Erzsébet" — dirigento *Maria M. Katanics* — gajnis same unuan premion; la saman rezulton atingis la ĥoro kooperativa „Szabadság" sub la gvidado de *Imre Timár,* en Soppot (Pollando).

Ĉe la internacia ĥorfestivalo en Tallinn (Estonio) eksterordinaran premion gajnis la ĥoro „Ars musica" sub gvidado de *Miklós Csik.*

En Arezzo (Italio) ĉe internacia ĥora festivalo la hungara junulara ĥoro, kun sia dirigento *Gábor Ugrin,* gajnis kelkajn premiojn, ekz. en la kategorio popolkantoj la duan premion.

Escepte la laste menciitan ensemblon, ĉiuj ĥoroj pri kiuj ni raportis, ricevis unuan premion, pruvante la altan nivelon de la hungara ĥorkulturo.

Sed ĉi tiu nivelo starigas devon antaŭ la gvidantojn de la muzika vivo: ĉiam pli evoluigi kaj disvastigi la ĥorkantadon inter la muzikemaj hungaroj, precipe en la junularo, kiu ja estas la espero de la estonto.

Eminenta muziksciencisto mortis

Kie ajn mi vizitis eksterlandan muzikiston aŭ muzikologon, kiu ajn eksterlanda muzikfakulo vizitis min el ĉiu kontinento — la unua demando direktita al mi estis: kiel fartas *Bence Szabolcsi?*

Ne ĉiu jarcento naskas tiel universalan, ĉie rekonatan scienculon, kia estis Bence Szabolcsi — estis, ĉar ĵus li mortis en sia 74-a jaro.

Dum lia duonjarcenta scienca agado la fakuloj de la tuta mondo sciiĝis, ke ekzistas en Eŭropo nacio, ne multnombra, sed havanta tiel eminentan filon, kiel la eksterordinare multflanka, multescia, multekapabla muzikologo Bence Szabolcsi, konata ĉie, kie oni vivas altnivelan kulturan vivon.

Li plenumis duoblan taskon en la vivo de la postfaŝisma liberiĝinta Hungario: fondi kaj ellabori la hungaran muzikhistorion, konvenan por nia tempo, kaj krei atmosferon, en kiu naskiĝu ne nur muzikhistorio ne nur muzikkulturo, sed ankaŭ altnivela morala kaj spirita vivo, kies konsekvenco estu, ke la ŝtato akceptu la muzikkulturon socia afero.

Bence Szabolcsi estis eksterordinare grava esploranto de la hungara kaj universala muzikhistorio kaj samtempe li malkovris gravajn faktojn, leĝojn kaj interligojn de la muzikarto. Ne nur Béla Bartók kaj Zoltán Kodály, sed ankaŭ li laboris kaj penadis, kune kun ili kaj ankaŭ lia merito estas, ke en nia tempo la hungara muzikkulturo estas konata kaj rekonata en la tuta mondo, en ĉiu lando, kie oni ŝatas kaj ludas muzikon. Lia merito estas, ke nuntempe en Hungario sed ankaŭ en aliaj landoj, la publiko komprenas kaj taksas alte la modernan muzikon tiel same, kiel la hungaran popolmuzikon de la praepokoj. Tiamaniere servas la muzikkulturo la moralan edukadon de la homoj.

Bence Szabolcsi estis ano de la Hungara Akademio de Sciencoj, direktoro de la Muzikscienca Instituto gvidanto de katedro de la Budapeŝta Muzika Altlernejo „Ferenc Liszt". Dufoje li gajnis la premion „Kossuth", la plej altan hungaran distingon por konstrua laboro pri evoluo de la lando. Li estis posedanto de multaj hungaraj kaj eksterlandaj distingoj, ano de multnombraj sciencaj societoj.

Ni eĉ ne povas ankoraŭ ĝuste taksi la valoron de lia verkaro. Ĉi tio estas nia estonta devo. Sed ne nur ni hungaroj — la tuta intelektularo de la mondo sentas lian morton granda perdo.

Premiitaj hungaraj kompozicioj

Kelkaj internaciaj aranĝaĵoj havas la celon doni distingojn al muzikverkoj de la tutmonda muzika vivo. Ĉiujare troviĝas hungaraj kompozicioj, kiuj gajnas premiojn kaj pro tio certe meritas ĝeneralan atenton. Nur mi mencias nur la plej altajn premiojn, atingitajn de hungaraj komponistoj en la pasintaj du jaroj.

La IGNM (internacia societo por nova muziko) donis en 1971 en Londono ĉefpremion al *Attila Bozay* por la kompozicio „Partoparo", kaj al *Rudolf Maros* por la verko „Monumentum". En 1972 la sama societo, ĉe sia festivalo en Graz (Aŭstrio) premiis *György Kurtág* pro la kompozicio „Memoro pri vintra vesperkrepusko".

En 1971 ĉe la Budapeŝta Muzika Konkurso ricevis duan premion la II. arĉkvarteto de *Zsolt Durkó.*

La organizacio „Internationales Komponistenforum" (internacia komponista forumo) en sia kunveno donis unuan premion al *András Szöllősy* pro lia III. Koncerto kaj en 1972 same la unuan premion al la „Rekviemo" de *Sándor Balassa.*

D-ro Lajos *Lesznai*

MIKLÓS BORSOS

Nia artist-gasto de la nuna numero, Miklós Borsos, estas unu el la plej originalaj talentoj de la nuntempa hungara artvivo. Li ilustris multajn volumujn de Gyula Illyés, kiun ni prezentas al la legantaro.

Borsos naskiĝis en 1906. Li komencis la studjarojn kiel pentristo; ankaŭ hodiaŭ multaj pentraĵoj gardas en lia artlaborejo travivaĵojn pri lia studvojaĝo en Italio kaj Francio. Li estas talenta kaj sukcesa artisto, kiu gajnis jam la plej altajn ŝtatrekonojn: la Munkácsy-, kaj Kossuth-premiojn. Li gajnis la unuan premion de carrara-skulptura ekspozicio en 1959, kaj li partoprenis en Venecia Bienalo en 1966.

Kio karakterizas lian artmondon? — Sendube li estas eŭropa-ranga fenomeno: humanisto, altkultura artisto, kaj ĉefe tiuj trajtoj determinas liajn skulptaĵojn kaj desegnaĵojn. Se oni povas rigardi, eĉ studi ĉi tiujn artaĵojn, en la unuaj minutoj senteblas la sugestiva beleco, la vera homa beleco kaj intelekto, kiujn radias liaj skulptaĵoj. Kaj ne nur tiuj, kiuj formas junajn virinojn, belegajn virinajn vizaĝojn kaj korpojn, sed ankaŭ tiuj, en kiuj li eternigis verkistojn, artistojn, liajn amikojn kaj sin mem.

Ekde 1943 ĉiusomere li loĝas, laboras ĉe la Balatono en Tihany, en sia tipa mediteran-atmosfera domo kaj estas certe, ke ĉi tiu medio forte influas lian tutan laboron. Se oni povas vidi lin, lian artlaborejon en la ĝardena dometo de Tihany, tiam ni kapablas pli bone kompreni ĉi tiun artmondon. Kiel Miklós Borsos, ankaŭ Gyula Illyés, la plej eminenta verkisto de nia nuntempo, vivas ĉiusomere en Tihany, kaj ilian amikecon motivas ankaŭ la ĉarma, riĉa pejzaĝo.

Mihály *Gergely*



M. Borsos: Portreto de Gyula Illyés (marmoro)



M. Borsos: Du formoj (marmoro)

Vizito en la Atomkern-esplora Instituto en Debrecen

Debrecen, nia tria grandurbo, situanta sur la Granda Ebenaĵo, estis longe nomata la plej granda kamparan-urbo de Hungario kaj ankaŭ „Kalvinana Romo", ĉar ĝi estis kvazaŭ la ĉefurbo de la hungara kalvinismo. Kelka industrio komencis en ĝi evolui en nia jarcento, sed nur ekde la liberiĝo de la lando post la dua mondmilito ĝi komencis intense industriiĝi kaj ĉi tiu procezo daŭras plu kontinue. Antaŭ 20 jaroj tie ricevis lokon ankaŭ la Atomkern-esplora Instituto de la Hungara Scienca Akademio. De tiam ĝi evoluis signifa instituto de la hungara scienco kaj atingis rezultojn seriozajn.

La direktoro de la instituto, Prof. dro Sándor Szalay membro de la Hung. Scienca Akademio, estas pioniro de la patrolanda atomfizika eksperimenta esploro.

La instituto laboras nun en moderna konstruaĵo provizita per ĉia scienca kaj teknika rimedo. La triono de ĝia personaro estas esploristoj. La esplorlaboro okazas en sciencaj sekcioj: sekcio de kernreakcioj kaj ties scienca apliko; sekcio de kernspektografio; sekcio de elektrostatiko akcela; sekcio de nukleara elektroniko. La bonege ekipita teknika biblioteko entenas 20 000 diversajn faklibrojn, revuojn ktp.

Interesiĝinte pri la diversaj esplortaskoj, ni sciiĝis, ke la Instituto okupiĝas ĉefe pri baz-esploroj, nome:

1. Esploras la kern-reakciojn. 2. Faras esplorojn kern-spektroskopiajn. 3. Evoluigas kernfizikajn rimedojn kaj metodojn. 4. Aplikas kernfizikajn metodojn en aliaj sciencoj.

La Instituto atingis konsiderindajn rezultojn je ĉiuj esplor-terenoj ĉi-supraj. Ĝi evoluigis ekzemple striospektroskopon, kiu, uzata por kern-spektroskopio, estas unika en la tuta mondo. Antaŭnelonge finiĝis la konstruo de Van de Graaff-generatoro de 5 MV nominala elektrostreĉo. Ĉi tiu laboro necesigis organizon de memstara elektronika sekcio. En tiuj esploradoj la instituto tenis striktan kontakton kun la Unuigita Atomkern-esplora Instituto en Dubna.

Jam dekomence la Instituto ambiciis utiligi la esplorrezultojn por solvo de koneksaj problemoj en aliaj sciencobranĉoj. Speciale elstaraj estas la eksperimentoj pri la mankomalsanoj de la kulturkreskaĵoj. Evidentiĝis, ke sur la marĉhumoj la kreskaĵoj „malsatas" pro manko de nutraj mikroelementoj, kaj oni difinis ankaŭ la mezuron de la manko. Per tio oni povas esplori, kiel utiligi por kulturado tiujn marĉ-terenojn konsiderinde grandajn nialande. Ĉi-koncerne la eksperimentoj daŭras kune kun la Agrarscienca Altlernejo en Keszthely.

De jaroj ili kontaktiĝas intense kun la Medicina Universitato de Debrecen, sukcese solvante la medicinbiologian aplikon de radioaktivaj izotopoj.

Grandsignifa malkovro estis, inter kiaj cirkonstancoj la uranio densiĝas laŭsperte en organikaj substancoj. Baze de tiuj esploroj la instituto atentigis — male al opinio de kelkaj geologoj — ke uranio-trovejo estas supozebla ĉirkaŭ la hungara montaro Mecsek. La baldaŭa min-esploro pravigis la supozon, kun konsiderinda gajno por la popol-ekonomio. Tiujn esplorojn iniciatis Sándor Szalay kaj liaj kunlaborantoj. La esplorrezultojn pri la densiĝo de uranio en organikaj substancoj Prof. Szalay prezentis en multnombraj forumoj de Moskvo ĝis Londono, kaj en la fakliteraturo oni rekonis internacie la signifon de tiuj pioniraj reserĉoj.

Pro la specialaj instrument-pretendoj la Instituto devis mem zorgi pri ties kontentigo. En tio partoprenis ne nur la inĝenieroj kaj teknikistoj, sed ankaŭ la esploristoj. Ili kreis propraforte la 300 KV-an neŭtron-generatoron kaj la 800 KV-an kaskad-generatoron kaj krome eĉ helpis aliajn institutojn evoluigi instrumentojn. Post la konstruo de 1 MV-a elektrostatika akcel-garnituro ili sukcesis enlande produkti Van de Graaff-generatoron de 5 MV. La kernfizikaj instrumentoj konstruitaj en la Instituto estas egalvaloraj al la produktaĵoj de la avangardaj industriaj firmoj. Unu el la inventaĵoj rezultigis 9 milionojn da forintoj por la popol-ekonomio.

La instituto donas sisteman helpon por la universitata instruo. La esploristoj regule lekcias. De ili, ekde la fondiĝo ĝis nun, aperis ĉ. 900 sciencaj kaj 120 sciencpopularigaj komunikaĵoj; el ili ĉ. 300 fremdlingve. Ilia bibliografio, detale laŭ la temoj, iam ajn estas disponigata por interesiĝantoj.

Multaj eksterlandanoj vizitis la instituton el ĉiuj partoj de la mondo, de Japanio ĝis Usono. Kelkaj pasigis tie longan tempon por efektivigi komunan esploron aŭ pretigi tie sian kandidatan disertacion. La instituto faris komunan esplorlaboron aŭ aperigis komunajn komunikaĵojn ekde kun Dubna ĝis kun preskaŭ ĉiuj samcelaj sciencaj institutoj de Eŭropo.

Kiel diveneble el la diritaĵoj, la Instituto estas modeste dotata kaj nuntempe ne disponas pri grandaj korpusklo-akcelaj garnituroj. La sekreto de ĝiaj sukcesoj kaŝiĝas en la erudicio, esplorema spirito kaj amika kunlaborado de ĝia esploristaro, elformita per dudekjara talento-serĉa laboro.

ISTVÁN LÁSZLÓ



KORONA



KÉKES



KARINA

Plej granda estas la sortimento en la Loĝejinstala Magazeno

DOMUS

AĈETU ĈION EN UNU LOKO!

ENLANDAJ KAJ IMPORTITAJ MEBLOJ,
TEKSAĴOJ POR LOĜEJOJ, LUMIGILOJ.

Vendejo DOMUS

H 1151 Budapeŝto, XV., Sipos Dénes u. 9—11.

Malfermita:

labortage inter la 10—18-a horoj,
sabate inter la 10—15-a horoj

Alveturo:

per aŭtobusoj de n-ro 25 kaj 70

Jardekoj en la servo de la hungara kulturo

Unikan kaj tre altvaloran manuskripton gardas la plej granda Hungarlanda biblioteko: la ĝis nun plej kompletan bibliografion pri la fremdlingvaj eldonoj de hungaraj verkoj.

Kopiaĵon de tiu grandioza kolektaĵo posedas ankoraŭ la Hungara Scienca Akademio kaj la Literatura Muzeo en Budapeŝto, krome kelkaj ekzempleroj troviĝas ankaŭ eksterlande; tiujn egale uzas profesoroj de universitatoj Harward aŭ Lomonosov, arabaj bibliotekistoj kaj ĉinaj literatoroj.

La verko *„Bibliographia Hungarica"* konsistas el 11 volumoj, kaj havas precizajn indikojn: *kie, kiam, en kiu lingvo, en kies traduko aperis iu ajn verko de hungara literaturo,* ĉu temas pri aparta libroeldono, ĉu pri unufoja publikaĵo en iu revuo. Specialan karakteron kaj eksterordinaran valoron havigas al tiu bibliografio, ke la indikoj estas donitaj ne nur hungare, sed ankaŭ en la lingvo de la unuopaj koncernaj tradukoj, — tiel la tekston tajpitan ofte buntigas permane skribitaj arabaj, birmaj, ĉinaj, hebreaj, japanaj skribsignoj.

Ĝian veran valoron povas rekoni nur malmultaj fakuloj, scienculoj, sed la graveco de tiu kolektaĵo de tempo al tempo multobliĝas; ekzemple nun — okaze de gravaj jubileoj de *Petőfi, Madách* kaj *Illyés* — ĝi estus tute nemalhavebla. Subskribinto ankaŭ utile foliumis tiun verkon, sed se mankas ankoraŭ la plej freŝaj, en la Bibliografio ankoraŭ ne registritaj indikoj . . . — kie informiĝi?

Kie estas la aŭtora kolektivo plenuminta tiun grandegan taskon?

Kie estas la instituto, inicianta, akordiganta kaj financanta tiun gravan entreprenon?

Sur la kovrilpaĝo staras nomo unusola: *kolektis kaj redaktis Dro Tibor Demeter.*

LA UNUA SURPRIZO

La nomo estas konata nur en ekskluzivaj, esoteraj rondoj: inter filologoj, literatoroj, ĵurnalistoj. Iu rememoras la unuan postmilitan kulturan revuon „Opera" — kies redaktoro kaj eldonisto estis Tibor Demeter. Aliulo legis de li eseojn kaj poemojn en Usona hungarlingva literatura revuo. Kaj kelkaj parolas pri *Dro Tibor Demeter* — kiel pri *inĝeniero de scienca industria esplorinstituto.*

Kiel? Ĉu la bibliografo kaj inĝeniero estas la sama persono? Ĉu vivas ankoraŭ en nia moderna epoko polihistoroj? Ĉu estas akordigeblaj tiuj du tute diferencaj sferoj de agado? — La respondon jesan fakte jam pruvis Dro Demeter, kaj baldaŭ ni povos lin aŭskulti ankaŭ persone.

CENTRO EN SUBURBO

Proksime al la finhaltejo de metro-linio, sed for de l' bruo de ĉefurbo, inter vilaĝeskaj familiaj domoj staras modesta villo en zorgeme kulturita florĝardeno. Loĝejo en la teretaĝo, biblioteko kaj laborejo sur la unua. Pentraĵoj, gravuraĵoj, prezentantaj modernajn hungarajn kaj mezepokajn italajn majstrojn. Nenie kontraŭdiro, ĉion regas harmonio kaj sintezo.

Tie vivas kaj laboras kun fanatika pasio Dro Tibor Demeter kaj lia sola kunlaboranto: lia edzino.

El tiu centro ili observas la mondon de kulturo, kaj ilia rigardo atingas kvin kontinentojn. Tien alvenas signoj pri la disvastiĝo de hungara literaturo: sciigoj kaj sendaĵoj de diversnaciaj eldonistoj, literatoroj, bibliotekistoj.

La adresito prilaboras la materialon: la „rikolto" en unu jaro estas ĉirkaŭ 2000 slipetoj.

Kaj ĉion nur „hobie", kiel privatulo, post la ĉiutaga inĝeniera laboro. Tamen tiu „hobio" estas pli ol nura pasio, eĉ pli ol profesio — *misio ĝi estas.* Dudeko da pagitaj dungitoj ne povus plenumi la saman laboron, ja nenio povas anstataŭigi la fanatike entuziasman kaj samtempe humilan amon de nia kulturo, literaturo.

Ĵurnalistoj estas oftaj gastoj ĉe la familio Demeter; tie oni povas ŝanĝi opiniojn kaj pri la filozofiaj tezoj de Bergson, kaj pri japanaj versformoj hajko kaj utao, aŭ oni povas aŭskulti prelegon pri la sekretoj de ĉina kaj araba skribmaniero . . . S-ro Demeter volonte parolas ankaŭ pri sia laboro, eĉ pri metiejaj sekretoj, nur la pripersonaj demandoj estas evitendaj, kiel — laŭ li — negravaj, flankaj.

Tamen la intervjuanto riskas la demandon:

Kial Vi ne fariĝis laŭprofesie literaturhistoriisto?

— Malfacile estus klarigi. Mi akiris juran diplomon, poste mi finis politeĥnikan universitaton. Ambaŭ kvalifikojn mi bone sukcesis utiligi en mia laborejo, en la scienca instituto, kaj oni bezonis tion. Tiu porpana, sed ankaŭ ŝatata laboro certigis la kondiĉojn de la sendependeco, kiun mi ĝuas ĉiterene. Mian agadon orumas libereco de pasio, kontraŭ la deviga laboro.

AKCESORA POLIGLOTO

Kiamaniere Vi aranĝas la aferon, de kie estas la eksterlandaj kontaktoj?

— Mi parolas 8 lingvojn perfekte. Kaj aliajn 62 mi komprenas, mi konas ilian skribmanieron, kaj kun vortaro mi kapablas kompreniĝi. Ĉi-terene —sed ankaŭ en aliaj fazoj de la laboro — multe helpas al mi mia edzino, kiu estas profesorino de rusa lingvo. Ŝi okupiĝas precipe pri la tereno de slavaj lingvoj.

Ĉu la lingvoscio sufiĉas?

— Lingvoscio servas kiel ponto; la ceteraj rimedoj povas esti: amikaj rilatoj aŭ mono.

Estante poligloto certe Vi neniam bezonis internacian helplingvon. Tamen logike staras la demando kiel vi opinias pri Esperanto? Ĉu vi priatentis ankaŭ la esperantlingvajn tradukojn? Permesu, ke mi donacu al vi raraĵon: la unuan E-lingvan „Johano la Brava". Ĉu vi konis tiun eldonaĵon?

— Jen la respondo — montras s-ro Demeter al la librobreto, kie mi revidas konatajn al mi librojn: la paraĵon de la ĵus donacita libro inter „Libero kaj Amo' kaj la ĉina eldono de „Johano". — Cetere Esperanton mi neniam studis, sed konas kaj la logikan strukturon kaj la riĉan esprimpovon de la lingvo. Mi havas malnovajn amikojn esperantistojn kaj mi gardas multajn komunajn memorojn pri ili. Sed la plej agrablajn impresojn donis al mi du persone nekonataj konatoj: Baghy kaj Kalocsay. *La hungara kulturo multe ŝuldas al ili, ĉar ili malfermis novajn pordojn por la disvastiĝo de nia literaturo. Mi observis kaj registris jam la poemtradukojn de Marich kaj Fuchs, sed mi scias ankaŭ pri la nederlandaj kaj japanaj tradukoj, kiuj naskiĝis pere de Esperanta traduko.* Esperanton mi trovas ne nur bona kaj necesa ilo, sed mi ĝin sentas mia propra afero.

Eble Vi studis kaj prilaboris ankaŭ la originale esperantlingve verkitajn verkojn de hungaraj esperantistoj?

— Kompreneble; ja ili apartenas nedisigeble al la hungara kulturo. Mi sekvis la vojon de verkoj de hungarlingvaj verkistoj vivantaj denaske ekster Hungarlando, kaj mi observis la reeĥon ankaŭ de verkaro de elmigrintoj, eĉ, se ili jam verkas prefere angle. Kial mi ne kalkulus la verkojn de la enlande vivantaj hungaraj verkistoj, kiuj uzas lingvon internacian? Mi nur de vi aŭdis, ke *Maŝinmondo* pasintjare aperis ankaŭ hungare, sed la pli fruan esperantlingvan eldonaĵon mi akiris kaj studis. Mi ne nur konas, sed rekonas ilin, kaj fieras pli ili, kiel pri produktaĵoj de la hungara spirito.

Kiel vi vidas la staton de disvastiĝo de nia literaturo?

— La disvastiĝo ĝojige progresas, plifortiĝas. Kaj se ni kalkulas la izolecon kaj la malfacilecon de nia lingvo — la nura fakto, la ekzisto de multaj tradukoj signifas la rekonon de valoroj de nia kulturo.

Kiuj hungaraj poetoj, verkistoj estas plej konataj, popularaj, eksterlande?

— Tio sanĝiĝas de tempo al tempo, kaj diferencas laŭ la diversaj nacioj, popoloj. Tamen *sendube Petőfi estas la plej konata. Li akiris unua famon ne nur Eŭropan sed ankaŭ tutmondan.* El la prozistoj *Jókai;* aŭ rigarde la nuntempan literaturon: Gyula *Illyés,* László *Németh* kaj Tibor *Déry* estas la plej konataj.

Tiu intervjuo aperos en nia numero dediĉata al Illyés. Ĉu Vi prezentus al ni lian eksterlandan karieron?

— Anstataŭ prezento staru tie nur resumo: *li debutis unue franclingve,* en antologio Poesie Hongroise, *en 1927. Liaj verkoj aperis en ĉirkaŭ 30 lingvoj,* kaj inkluzive ankaŭ la poemojn, *li havas ĉirkaŭ 3000 tradukojn. Eksterlande plej konataj estas de li „La popolo de la stepkortoj" kaj „Petőfi".*

Vi povas ĝui la saman verkon en pluraj tradukoj, ankaŭ kompari ilin. Kiel Vi opinias koncerne la arttradukadon pri la multe diskutata problemo de „egalrangeco"? Ĉu estas bezonate, ke la tradukisto estu samnivele talenta, kiel la tradukita poeto, verkisto?

— Ne, laŭ mia opinio, tio ne povas esti kondiĉo de bonaj tradukoj. Ĉu ni rezignu ekzemple pri la verkoj de Shakespeare, ĉar ankoraŭ ne naskiĝis poeto, tradukisto havanta la saman talenton? Multe pli gravas la proksimiĝo al la tradukota verko, la humileco rilate la originalon kaj ties aŭtoron. Nur el tiu starpunkto povas naskiĝi traduko fidela kaj valora.

Via laboro prezentas en si mem netakseblan valoron. Kio estas la sekreto de la kreado?

— Unue: ni trovu pasion en la laboro. Tio estas kondiĉo ne nur de sukcesa laboro, sed ankaŭ tiu de homa feliĉo. Due: la fido en si mem, memfido sed baziĝanta sur serioza scio kaj faksperteco. Estas bezonata ankaŭ persistemo, kaj iom da tempo por maturigi la verkon.

Kiam ĉi vicoj aperos, s-ro Demeter, la inĝeniero jam estos pensiulo. Sed certe la bibliografo ne ĉesigos la laboron?

— Eĉ, male. Post la pensiumo duoblan tempon mi povos oferi por la studado de mondreeĥo. Krom tio mi intencas kolekti kaj eldonigi miajn eseojn, en kiuj en la spegulo de la hungara literaturo mi deklarus miajn tezojn, por aldoni iom al la marksisma estetiko.

Granda entrepreno, inda je antaŭaj!

Mi dankas la intervjuon kaj deziras pluan fruktodonan agadon!

Márton *FEJES*

Konferenco en Moskvo pri la lingvo de internacia komunikado

En la Instituto de Rusa Lingvo de Scienca Akademio de USSR, okazis konferenco inter 24—27 de Oktobro pri la temo: „Interrilato de naturaj kaj artefaritaj lingvoj".

Dum kvar tagoj scienculoj-lingvistoj pridiskutis multflankajn aspektojn de la lingvaj problemoj, konsideradis detalojn de interligo de diversaj homoj, kiel interne de nacioj kaj popoloj, tiel ankaŭ inter nacioj de diversaj kontinentoj.

Precipe interesa estis la kunsido de la lasta tago: la 27-a de Oktobro. Tiam kolektiĝis pli ol 100 personoj. La bazan raporton faris docento *M. I. Isajev* (Moskvo) pri la temo: „Naturaj kaj artefaritaj lingvoj en la tutmonda interkomunikado". Tre konvinke li karakterizis la perspektivan progreson de la aktualaj internaciaj interrilatoj kaj samtempe la neceson utiligi la rimedojn de la internacia interkomunikiĝo. Li emfazis, ke la kvin (kaj estonte ĝis dekdu) naciaj lingvoj utiligataj en UNO neniel povas plene solvi la lingvan problemon, ĉar ili postulas intensan laboron de multaj tradukistoj kaj konsumon de grandaj materialaj rimedoj. Tio urĝas la solvon de la problemo, kiel utiligi unu solan lingvon por internacia komunikado. Multnombraj esploroj kaj eksperimentoj pruvas, ke por tiu rolo plene taŭgas Esperanto, sukcese aplikata jam en ĉiuj landoj plurajn dekojn da jaroj.

La kunparolantoj de M. I. Isajev estis:

1. *S. N. Kuznecov* (Moskvo) pritraktis la problemon pri la tipologia klasifiko de internaciaj plan-lingvoj. Sufiĉe detale li karakterizis kelkajn internaciajn lingvojn, dividante tiujn per rangado laŭ nivelo de komplikeco, konstruo kaj aliaj funkciaj apartaĵoj. El la komparado evidentiĝis la avantaĝo de Esperanto super ĉiuj konkuraj lingvoj.

2. *V. F. Grigorjev* (Moskvo) raportis pri kelkaj problemoj de normalizado en la strukturo de la internacia lingvo Esperanto kaj konvinke pruvis, ke la normala evoluo de Eo estas konvena al la aktuala situacio kaj tute klara socia fenomeno, kiel en la naturaj naciaj lingvoj.

3. *V. A. Vasiljev* (Moskvo) parolis pri tio, kiaj estas la lingvo-strukturaj, instruo-metodikaj kaj sociologiaj premisoj por la apliko de la lingvo de internacia komunikado en la ĉiutaga uzado. Li aprecis objektive la ĉi-koncernan situacion nun ekzistantan, menciis la sukcesan utiligadon de Eo en la UNESKO-organizaĵoj kaj la malperfektaĵojn de la maŝina tradukado.

4. Prof. *D. L. Armand* (Moskvo) citis multajn ekzemplojn pri la ebleco, kiel uzi praktike Eon cele de scienca informado, kaj proponis presi resumon de sciencaj artikoloj en Eo en formo de slipoj, el kiuj poste oni povas kompili sliparon laŭ sciencofakoj.

5. Dro *A. I. Vaitilaviĉus* (Vilnius) karakterizis la vortaran enhavon de Eo kompare kun la vortaroj de la etnaj lingvoj. Li notis, ke la eblaĵoj de vortkonstruado en Eo estas preskaŭ senlimaj, kio donas al ĝi avantaĝon super la etnaj lingvoj.

6. *E. A. Mozerts* (Riga) parolis pri la interrilatoj de la ‚naturaj" lingvoj (latva, rusa, angla) kaj de Eo. Li eksplikis detale la problemon de interferenco kaj transferenco ĉe la komparo de apartaj lingvoj kaj iliaj gramatikaj specifikaĵoj, la influon de unu lingvo al la alia dum ilia samtempa lernado.

7. *A. M. Liĥtgeim* priparolis la grafikon kaj ortografion de la naturaj lingvoj kaj planlingvoj. Li tuŝis la komplikecon de la ortografio en kelkaj etnaj lingvoj kaj la malfacilecon de ilia posedo, dum la ortografio de Eo estas tre simpla, bone komprenebla: al unu litero respondas unu sola difinita sono; tio tre simpligas ĝian ellernon.

La kunsidoj de la konferenco pasis sur alta scienca nivelo.

Inĝ. *T. Kulagin* (Moskvo)

Jubilea datreveno de Sándor Petőfi en Estonio

Kiel en pluraj landoj de la mondo, tiel ankaŭ en Estonio oni festis vaste la 150-an datrevenon de la naskiĝo de granda hungara poeto Sándor Petőfi. En la universitato, en lernejoj kaj en diversaj institucioj oni okazigis prelegojn kaj solenaĵojn. Ekspozicioj pri la literaturo de S. Petőfi estis aranĝitaj en ĉiuj pli gravaj bibliotekoj. La plej kompleta el ili troviĝis en la scienca biblioteko de ŝtata universitato en Tartu (ĝi enhavas pli ol 3 milionoj da libroj), kie estis ekspozita ankaŭ la sola aŭtentika portreto de la poeto, kiu troviĝas sur la paĝo de „Hungara Vivo".

Estas interese rimarki, ke kompare kun la aliaj eksterlandaj verkistoj, oni publikigis en Estonio dum la pasinta jarcento plej multe la poemoj de S. Petőfi. Lia unua poemo aperis en la jaro 1886 sub la titolo „Mi estus fluanta rivero", tradukita en estonan lingvon de lingvisto M. Veske, rekte el la hungara lingvo. Sekvontjare aperis biografio de S. Petőfi. La artikolo komenciĝas kun la aserto, ke la poezio de madjaroj estas lastatempe trovinta respekton kaj vivan atenton en ĉiuj kulturpopoloj. Plej eminenta reprezentanto de hungara poezio estas Sándor Petőfi, „la plej granda poeto de amo kaj libereco, kian oni neniam pli frue vidis en la tuta mondo." La aŭtoro de la biografio trovas, ke „liaj poemoj, plejparte pasiaj liberkaj amkantoj, havas freŝan pensimagon, naturan kaj simplan lingvon de la popolo, sed tamen ili kondukas nin, estonojn, kvazaŭ en novan mondon, kie ni sentas nin malgraŭ tio tute hejmece."

Post la apero de la biografio oni ektradukis fervore la verkojn de Petőfi en la estonan lingvon. Ĝis la fino de la pasinta jarcento estis publikitaj en la estona lingvo 38 liaj poemoj en diversaj gazetoj kaj ĵurnaloj. Parto el ili estis tamen tradukitaj el la germana kaj rusa lingvoj.

Lia unua proza verko aperis en 1893 kaj la romano „Ŝnuro de la ekzekutisto" en 1911. Ĝis nun estas eldonitaj en la estona lingvo praktike ĉiuj verkoj de Sándor Petőfi, poeziaj kaj prozaj, unuope en revuoj kaj kolektite en libroformo. Pluraj aperis multfoje, inter ili ankaŭ liaj paralelaj poemoj „Kanto de la hundoj" kaj „Kanto de la lupoj", kiuj aperis ĝis nun estonlingve entute kvinfoje.

Kaj fine tute ne estas sekreto, ke pluraj estonaj poetoj kaj poetinoj, jam ekde la pasinta jarcento, ricevis inspiron kaj sentas sin lernantoj de la hungara poeto Sándor Petőfi, la poeto de la eternaj am- kaj liberkantoj!

R. Haabvere

Ni atendas vin kun granda sortimento de
artobjektoj, porcelan- kaj vitrovaroj,
ligno- kaj bronzo-skulptaĵoj,
antikvaj arĝent- kaj or-medaloj,
oraj kaj diamantaj juveloj,
en niaj vendejoj:



Budapeŝto, I., Hess András tér 3.
Hotelo Gellért
VI., Népköztársaság út 27
Hotelo Intercontinental

Antikvaj mebloj:
Konsumex V. Budapeŝto, V.,
Tanács körút 26.

Markhavaj pentraĵoj:
Artex V. Budapeŝto, V.,
Münnich Ferenc u. 31.

Tiuj varoj estas aĉeteblaj por konvertebla valuto kaj estas eksporteblaj el la lando sendogane.

Konsumturist



REVUO DE REVUOJ

NORDA PRISMO estas des pli kara, ju pli rara ĝi estas, t.e. ju pli malofte ĝi aperas; ni esperas, ke en 1973 nenia striko malhelpos ĝin aperi kvaronjare. En la lasta numero ree ni trovas multon tre legindan: prozon kaj poezion originalajn kaj tradukitajn, krome rememorojn de *Hilda Dresen* pri du jubileuloj: M. Lukáš kaj mi, notojn de *V. Benczik* pri la stud-principoj de la E-a literaturo, kaj riĉan recenzrubrikon. Granda surprizo estis por mi la traduko de la Elegio de Jorge Marique en la traduko de *Fernando de Diego:* ĝi montras tian leĝerecon en la venko de tradukmalfacilaĵoj kaj tian simple-naturan stilon en tiu diable virtuoza formo, ke mi nevole ekkriis: Jen, naskiĝis tradukanto por „Fuente Ovejuna" aŭ „La hundo de ĝardenisto" de Lope de Vega aŭ de la Calderón-a „La vivo estas sonĝo". La recenz-rubriko brilas per la novaj nomoj de *A. Goodher* (li elstaras ankaŭ per siaj enlule optimismaj „Robajoj") kaj *Clive Watkins;* ĉi lasta kun sia aklaminda kaj kompreniva recenzo pri „La Tempesto" trad. de Kalocsay.

La STARTO, organo de Ĉeha E-Asocio raportas pri la sepdekjarula jubilea festo de E-ista Klubo en Praha. Salutis la ĉeestantojn ankaŭ reprezentantino de la distrikta komitato de Komunista Partio Praha-9. Oratoris *J. Vitek,* rememorante pri la glora revolucia poeto *St. Kostka Neumann,* iama kunfondinto de la Klubo. Bela kultura programo kompletigis orname la feston. Sincerajn gratulojn! — Prudenta artikolo de *(jj)* rifuzas ja la utopiismajn ideojn de la abstrakta „homaranismo", sed emfazas, ke la „interna ideo", t.e. paca kunvivado de nacioj ne estas morta. — En recenzo de antaŭa numero, pri la Auld-a „Paŝoj al Plena Posedo", kondamnitaj estas kelkaj familiaraj mallongigoj („reprodo" anst. reproduktaĵo, „trankvi, trankvi"). „Ĉu tio estas Fundamenta? —" ekkrias Jeriko-trumpete la recenzisto. Nu, nia Fundamento estas sufiĉe fortika, por elteni tiujn, se ĝi eltenis la mallongigojn „kino" anst." kinematografo" kaj „buso" anst. „aŭtomobila omnibuso".

BONA ESPERO, gazeto de la Sudafrika E-Asocio ne apartenas al la paradaj produktaĵoj de la E-a preso, tamen ĝi meritas nun mencion. Unue, frontpaĝe ĝi publikigas poemon de la kompatinda EMBA kaj per tio iom rompas la surdan silenton, en kiun dronigis lin la sendanka E-a „postepoko". Due, ĝi parolas laŭde pri „Idiotismoj kaj kliŝoj en E-o", emfazante, ke ĉi tiuj devas esti internacie konstruitaj, ne enigmaj kaj absurdaj, kiel en la etnaj lingvoj, ekz-e en la angla.

THE BRITISH ESPERANTIST daŭrigas publikigon de E-aj originalaj poemoj kun ilia angla traduko. Ĉi-foje (1972, 11) aperis parto el la poemo „Ajno" de E. *Miĥalski* en la traduko de *W. Auld.* Ni salutu ĝin, kiel elmerititan omaĝon al tiu malfeliĉa poeto, kiu, por granda perdo de nia poezio, ne povis en la tempestaj tempoj plene maturigi sian grandan talenton. — *W. Auld* krome artikolas pri la kultura valoro de E-o. El la multaj citindaĵoj ni citu: „Esperanto... posedas literaturon, kiu esprimas idealojn kaj esperojn universalecajn, kaj... inspiris tian lojalecon, kian donas al homoj nur al aferoj, kiuj ŝajnas al ili kulture valoraj." — Mi jam skribis pri la pugne politikanta rubriko de *Dermod J. F. Quirke.* Fine de la rubriko li skribas, ke li bonvenigas komentojn, protestojn, eĉ insultojn. Nu, nun mi nur registras lian pledon por la samseksamuloj, kiuj en la venonta brita kongreso devos ludi pasivan rolon; ne miskomprenu: en ekzekutado, dum la aktiva rolo estos transdonita al la evangeliaj kristanoj. Li skribas ankoraŭ pri pluraj aferoj interesaj: pri manko de e-istaj obscenaj skribaĵoj sur la muroj, pri manko de aŭtoraj honorarioj, pri manko de „Elingita glavo" en la librolisto de la UEA-jarlibro, pri manko de ideologio en SAT. Pri ĉi lasta mi citas: „Ideologie kaj klasbatale SAT ĉesis aktivi antaŭ multaj jaroj: iom absurde tiu asocio fondita sub la devizo „For la neŭtralismon!", nun havas nur du signifajn agadojn *plene neŭtralismajn:* ĝi eldonas niajn du plej gravajn vortarojn kaj produktas tre oportunan verdstelan pinglon por jakoj". Efektive estas granda kontraŭdiro esti neneŭtrala kaj ne havi ideologion.

Oni devus almenaŭ rekoni tiujn tezojn de la historia materiismo, kiuj estas same definitivaj leĝoj, kiel la tezoj de Kepler kaj Newton. Tamen mi esceptus unu el la kunlaborantoj nome *Riĥter.* Lia artikolo „La altaj celoj de la laborista movado" tre klare vidas la aktualan situacion de klasbatalo kaj socialismo kaj citas eĉ la vortojn de *J. Kádár,* sekretario de la Hungara Socialista—Laborista Partio: „Ĉiu estas kun ni, kiu perlaboras sian panon en nia lando, kaj sendepende de tio, ĉu li estas ano de nia partio aŭ ne, aŭ al kiu raso, nacio aŭ religio li apartenas; se li estas kun ni, oni konsideru lin honorinda kaj helpema kamarado." Ĉi tio tamen povas ekzisti nur en ŝtato socialisma.

Plurfoje mi jam menciis laŭde en la Nederlanda KOMUNA E-GAZETO la lingvan parton redaktatan de *J. PH. Punt* kaj vere laŭdindan pro ĝia instruiveco en ĝiaj lecionoj (Malpli en ĝiaj teoriaĵoj). Nun mi mencias nur, ke kun surprizo mi vidis inter la lecionaj tekstoj parteton el „La strato de fiŝanta kato" eldonita iam de L. M. Nome, *G. J. Degenkamp,* konstanta kunlaboranto de tiu gazetparto, skribis pri tiu traduko en sia libreto „Esperanto 60-jara", ke ĝi, „makulas la purecon" de la literatura lingvo kaj „aspektas kvazaŭ tradukita de element-kursano".

Lajos Tárkony



Proponoj pri servoj de EXPRESS

Kontoro por Junularaj kaj Studentaj vojaĝoj

Eksterlandaj societaj vojaĝoj
Aranĝo de grupaj pasportoj
Al eksterlando: individua vojaĝo, prizorgo de hotelaj tranoktadoj
Enlandaj societaj vojaĝoj, 2+1 tagaj migradoj (du tagoj enlande)
Perado de enlandaj tranoktejoj, refreŝigejoj
Junularaj kampadejoj
Turismaj aranĝaĵoj
Vendado de en- kaj eksterlandaj veturbiletoj (individuaj kaj grupaj)
Ŝanĝo de valutoj



Tranoktejoj de EXPRESS-kontoroj por Junularaj kaj Studentaj vojaĝoj:

Hotelo Ifjúság 1024 Budapeŝto, II., Zivatar u. 1—3.
Ĉambroj kun 2—3—4 litoj
Hotelo Express 1126 Budapeŝto, XII., Beethoven u. 7—9.
Ĉambroj kun 2—3—4 litoj
Hotelo Express Panoramo H 9730 Kőszeg — Szabóhegy
Ĉambroj kun 2—3—4 litoj
H 8623 Balatonföldvár — Nemzetközi Üdülőtelep
Ĉambroj kun 2 litoj kaj banĉambro
Lignodomoj kun 4 litoj
H 2621 Verőce — Nemzetközi Üdülőtelep
Ĉambroj kun du litoj kaj banĉambro
Lignodomoj kun 4 litoj.
Refreŝigaj tendarejoj por mezlernejanoj.
Sinanoncado por la konigitaj programoj kaj peto de informoj ĉe EXPRESS Kontoro por Junularaj kaj Studentaj vojaĝoj
H 1054 Budapeŝto, V., Szabadság tér 16. Tel.: 317-777, kaj ĉe la Departementaj Express-agentejoj.

FACILAJ LEGAĴOJ

PATRINOJ KAJ INFANOJ

Brilanta suno orumis la branĉaron en la arbaro, kaj la luno vekis la merlidon en la nesto. Ĝi elsidiĝis sur branĉon kaj ĝojebrie kvikadis en la belegan mondon. Ĝia patrino, la zorgema merlino, maltrankvile rigardis la malcertan flugilmovon de sia ideto, kaj diris:

— Atentu, fileto! Vi estas ankoraŭ tre juna kaj malforta, ho, vi defalos, ĉar vi ne povas flugi, kara!

Sed la merlido atentis pri nenio, ĝi nur rampis supren inter la folioj. Ĝi estis fakte tre juna kaj malforta, nur ĝi ne sciis tion; ĝi sentis nur, ke ĝi estas tre feliĉa. Intertempe ĝi kriadis per maldika fajfado ĝis kiam ĝi raŭkiĝis.

— Ej, haltu, etulo, ne miskondutu! Venu jam hejmen, estu tiel bona, kiel viaj gefratoj! — petegis la merlino al sia gaje vigla infano, sed ŝi pensis fiere: mia kara! Kiel kuraĝa ĝi estas, simila al la patro, kaj ĝi kantas jam tre bele! Ho, vi, mia brava, bela infaneto! Kaj vi, ĉiuj, vi estas mirindaj kaj belegaj — rigardadis la merlpatrino en la neston, kie sidadis la aliaj tri merlidoj. Ili estis malgrandaj kaj preskaŭ nudaj, havis maldikan kolon kaj grandan kapon, sur la granda malbela kapo grandegan flavan bekon.

— Mi havas infanojn, kvar belegajn infanojn! — kantadis trilante la merlino, kaj la arbaro eĥis la flutadon. Ŝi ja estis vere bela: sian gracian korpon kovris pompaj, brilnigraj plumoj, ŝi havis longan orbekon, ŝiaj gajaj okuloj estis kiel karbunkoloj. Kaj sendube ankaŭ ŝiaj idoj estos tiel same ĉarmaj baldaŭ.

— Saluton, najbarino! — rukulis palumbino el la apuda arbo. — Mi vidas, ke ankaŭ vi havas infanojn, mi gratulas vin!

— Dankon, kara najbarino, sed venu kaj rigardu ilin! — diris afable la merlino. La palumbino ekflugis, kaj rigardis, rigardadis la merlidojn kaj pensis kompatante: Dio, kiel malbelaj ili estas! Feliĉe, ke mia najbarino havas malbonajn okulojn.

— Vere, ili estas ĉarmaj — kolumbumis ŝi, konsolante, kaj pensis feliĉe: — sed miaj infanoj!... Nu, vane, ja ne ĉiuj povas esti palumbidoj! Poste ŝi ankaŭ invitis la merlinon al sia propra nesto, ke ŝi povu montri al la najbarino la belegajn palumbidojn.

— Jen, ĉi tie ili estas! Mirindaj, ĉu ne? — La merlpatrino scivole ekrigardis en la neston kaj malpeziĝe ŝi flutis:

— Jes, ili estas tre belaj! — poste ŝi ekflugis kaj impetis hejmen kun facila koro. Ja, la kompatindaj palumbidoj estis preskaŭ nudaj; ili havis maldikan kolon kaj grandegan kapon — ili estis simplaj flavbekuloj! Kaj ili ne povas kanti, ili nur ploradas kaj grincadas, kiel rusta rado. Jes, ĉiuj ne povas esti merloj!

Brilanta suno orumis la branĉaron en la arbaro, kaj orumis ĉion, la plenajn nestojn, la feliĉajn birdpatrinojn, kaj la belajn, belegajn birdidojn — la tutan vivon.

Ida *Tarján*

„EGALRAJTECO"

Karlo S. (patro de du gefiloj) komencis eksedziĝproceson.

En la tribunala traktado li motivis sian decidon jene: „Nia geedzeco venis en nesolveblan krizon, ĉar mia edzino tute neglektas la loĝejpurigadon. „Mi koncedas — li daŭrigis — ke ŝi bone zorgas pri la manĝado, same pri la geknaboj. Sed la hejmo... kiel stalo de Augias".

La preciza familiestro zorgis ankaŭ pri „corpus delicti". Tuta serio da fotoj prezentas la senordajn ĉambrojn, la kuirejon kun amaso da nelavitaj vazoj ktp. Laŭ la viro, pro la malpureco en la hejmo mankas la harmonio, tiu ĉarma etoso, kiu nepre gravas por li kaj ankaŭ por la geknaboj.

La juĝistaro konstatis: „Estas fakto pruvita, ke la hejmo ne estas tiel bone zorgata, kiom la patro tion deziras. Tamen estus maljuste kondamni la edzinon sen konsiderado de la ekskuzaj cirkonstancoj. Nome, ankaŭ la edzino havas postenon. Ŝi pasigas en la laborejo tage 8 horojn. Hejmenirante la aĉetado estas ŝia tasko. Poste — sen helpo ŝi pretigas freŝkuiritan vespermanĝon, ĉar la sinjoro ja malinklinas manĝi konservaĵon kaj malvarman manĝaĵon. Same la patrino kontrolas la lecionojn de la geknaboj, prizorgas ilian puran vestaĵon (la edzo ne preferas la nilonajn subvestojn) ktp., ktp. Tute kompreneble, ke la edzino ne kapablas fari pli por la hejma brileco. Se la familiestron — diras la motivado de la verdikto — ne kontentigas la nuna „pureco", faru tion li mem. Laŭ la familia juro en la geedzeco egalas la rajtoj, sed egalas ankaŭ la devoj". Kaj la geedzeco ne estis ĉesigita.

Kompilis: Ada *Császár*

HUMURO

— Ne ekzistas regulo sen escepto.

— Stultaĵo! Ĉiu homo devas iam morti — kie estas escepto el tiu ĉi regulo?

— Nu, jen escepto el tiu regulo, ke ne ekzistas regulo sen escepto.

O

Steĉjo ofte hejmenportas el la lernejo maldecan vorton, kaj plezure ĝin diradas. La patro malesperas pro tio, kaj foje, por provi ion, li diras al la knabo:

— Fileto, se vi ne uzos plu tiun maldecan vorton, post unu semajno vi ricevos unu forinton.

La knabo obeas kaj post unu semajno ricevas la forinton. Sekvatage, hejmenveninte, li diras kun radianta vizaĝo:

— Paĉjo, mi scias vorton, por kies nediro mi ricevos de vi minimume kvin forintojn.

O

Alta, ekscitita voĉo telefonas al policejo:

— Bonvulo tuj sendi policanon, mi estas en terura danĝero.

— Kio okazis?

— En la ĉambron venis kato.

— Kiel vi kuraĝas fari tian malbonan ŝercon?

— Sed, sinjoro, komprenu, mi ne estas virino, mi estas papago!

O

Prezident-elekto okazas en Usono. Riportisto intervjuas personon atendantan antaŭ elekto-budo:

— Kion vi opinias pri la du kandidatoj?

— Feliĉe ankoraŭ, ke oni povas elekti nur unu el ili.

Spirita eksporto

La hungara parlamento en Decembro pritraktis gravajn proponojn, la ŝtatan budĝeton por 1973, tiris konkludon el vigla debato pri la ekonomia vivo ktp. En la interesa referaĵo de *Péter Vályi*, vicprezidanto de la ministra konsilio, temis inter aliaj pri la eksterlanda konigo de hungaraj produktoj, inventaĵoj, projektoj, kaj pri tio, ke oni devas pliigi nian eksporton spiritan.

Fakte, el nia malgranda lando daŭre elfluas diversaj kulturvaloroj al la tuta terglobo; ni menciu, krom la laboroj de scienculoj kaj inventistoj, la artaĵojn de literaturo, muziko, pentro kaj skulpto, teatro, filmo, televido. Kaj al ĉio ĉi aldoniĝas ankaŭ la sukcesa kaj efika penado kaj agado de multaj hungaraj esperantistoj, nunaj kaj iamaj. Ĉiujn el tiuj kultur-eksportantoj mi eĉ ne povas mencii, do nur skize mi provas ilin memori kaj apreci.

La aperigon de „Lingvo Internacia" savis kaj ebligis siatempe (en 1900) la presisto *Paŭlo Lengyel* en Szekszárd. Vastan agadon en la E-a pacmovado komencis dro *Aleksandro Giesswein*. Poezio kaj literaturo ekfloris komence de la 20-aj jaroj dank' al *Julio Baghy* kaj *K. Kalocsay*. Aŭdovidan instruadon — kiam pri tio en aliaj lingvoj oni apenaŭ parolis — enkondukis *Andreo Cseh*, helpate de kelkaj hungaroj, kiel *Stefano Barta, Ferenc Szilágyi, Julio Baghy*. La regulojn de la E-a vortfarado difinis definitive *K. Kalocsay*, longe anticipante per tio la nuntempe modan strukturismon. Kaj jen LITERATURA MONDO, pri kiu ĵus abunde raportis H. V. Kaj jen ree *Ferenc Szilágyi*, kies literatura kaj kultura agado en Svedlando per la NORDA PRISMO kreis parte la posteulon de Literatura Mondo. Kaj jen nun HUNGARA VIVO kun siaj kunlaborantoj, verkistoj kaj poetoj: *V. Benczik, A. Császár, M. Gergely, L. Kökény, L. Somlai, S. Szathmári* kaj aliaj. Kaj ni ne forgesu pri *K. Bodó*, eksportinta prozon de *Babits* kaj *Karinthy*. Modelo de kultura-spirita eksporto estis la libroj de Literatura Mondo dank' al la agado de *V. Bleier*, longtempe fekundiganta la kulturan vivon de Esperanto. Ni menciu la didaktikajn meritojn de *I. Szerdahelyi*, la pedagogajn kaj leksikologajn laborojn de *A. Pechán*, la klopodojn de *T. Újlaky—Nagy* por kreo de la E-a sportlingvo.

Péter *Vályi* ne parolis pri ĉio ĉi. Supozeble, li eĉ ne estas bone orientita pri ĉi tiu spirita eksporto, negranda relative, sed gravega en sia sfero. Kaj mi timas, ke eĉ ne ĉiuj esperantistoj scias ekzemple pri la lastatempe eldonitaj libroj: „La Tragedio de l'Homo", la Petőfi-volumo, „Dudek horoj" de F. Sánta, „Vuk" de I. Fekete, „Sep reĝidoj" de B. Balázs, „Ora duopo", „Sklavoj de Dio" de Gárdonyi kaj aliaj.

Tamen, la alvokon de la ministro ni rilatigu ankaŭ al ni mem, farante kulturan eksporton per abono de H. V., per aĉeto kaj donaca elsendo de niaj eldonaĵoj. Ni havas vere valoran kultur-trezoron E-an, ni pie ĝin gardu kaj bone ĝin fruktuzu.

P. Balkányi.

* Kaj ni ne forgesu pri *P. Balkányi*, movad-motora, informkomunika *(Red).*

Hungara Fervojista Mondo

Ĉe la jarkomenco, kiam ĉiu gazeto, revuo ĝoje konstatas, ke ĝi povas paŝi al nova jarkolekto, Hungara Vivo pensas ankaŭ je tiuj aliaj Esperanto-gazetoj, kiuj agadas por nia kulturo. Ni pensas nun unuavice pri nia frata revuo Hungara Fervojista Mondo, kiu plenumas gravajn taskojn tre konscie kaj vere konscience jam ekde 1957, do estas kvar jarojn pli aĝa ol nia revuo.

HFM jam en sia unua numero difinis, ke ĝia celo estas antaŭ ĉio kunligi, helpi kaj direkti la dise laborantajn kolegojn kaj grupojn, informi ilin pri la gravaj en- kaj eksterlandaj okazintaĵoj de la fervojista kaj ĝenerala Esperantomovado, krome doni lingvan nutraĵon por pliperfektiĝo en Esperanto.

En la 1/1971-a n-ro de HFM ni legis detalan enhavtabelon pri la artikoloj de la unuaj dekkvin jaroj de la revuo. Artoj kaj sciencoj, landoj, urboj kaj regionoj, lingvaj kaj stilaj artikoloj, konferencoj kaj kongresoj, sporto, ŝako, filatelio kaj radio, teknikaj priskriboj kaj modernigoj, temoj pri la virinoj, junularo, edukado kaj sanitaro kaj ankaŭ literaturaĵoj i.a. de Julio Baghy, Kalocsay, Szathmári, Tárkony, Szilárd Bálint, Ferenc Egry kaj Mihály Gergely kaj serio da lingvaj artikoloj de László Boronkay — ĉu ĉio ĉi ne estas ĝojiga riĉaĵo?! HFM brave servas ankaŭ la pacmovadon kaj la progreson mem.

HFM estas subtenata, rekonata de la superaj fervojistaj instancoj de la Fervojista Sindikato. Ĝia fondinto, motoro kaj responda redaktoro estas ekde la komenco d-ro István Bácskai, ĝin redaktis preskaŭ dum dek jaroj Simon Csóra, poste ĝia redaktoro estas Pál Kristek. Hungara Vivo estas kontenta, ke ĝi havas tian kolegon, kia estas nia Hungara Fervojista Mondo. (L.K.)

RECENZO

Ivan Mazurovič: La morto de Smail-agao Ĉengiĉ. Tr. el la kroata *Josip Velebit.* Eld. Kroatia E-Ligo, Zagreb, 1972. 54 pp.

La eposeto, jam en 1933 tradukita de la iam tre konata E-pioniro Mavro Ŝpicer, aperas nun en freŝa interpreto. Pri ĝi mi povas ripeti, kion mi srkibis okaze de la unua traduko en mia recenzo (Bibliogr. Gazeto, 1933, 2.): Oni elsentas ankaŭ tra la traduko ian prafortan primitivan ter-odoron, kiu emanas el la lakonaj frazoj, pensoritmoj, vortoripetoj, sugestiaj bildoj kaj komparoj, kaj trans ĉi tiuj poeziaj valoroj la ekstazan aspiron je libereco, kiu pulsas tra la tuta verko. La draste elokventa pripentro de la sufero de sklavigita, subpremita, turmentata popolo faras la verkon unu el la rimarkindaj trezoroj de la mondliteraturo. Ne mirige, ke ĝi estas tradukita ĝis nun en 38 lingvojn.

Ĝi priskribas la agojn de la sangsoifa kaj or-avida turka agao Ĉengiĉ, kiu eltordas la „haraĉon" (kap-imposton) el la kompatindaj „rajahoj" (ne-islamanaj subuloj) per elektitaj torturoj. Kontraŭ lia krueleco, kiun korfrostige pentras la ĉapitro „Haraĉo", ribelas la montenegranoj kaj venĝas en sanga batalo: agao Ĉengiĉ falas. La lasta ĉapitro solenas tiun venkon kun popolbalada grando kaj gravo. Kaj la libro, bedaŭrinde, ĝis nun ne malaktualiĝis: ni pensu nur pri la Vjetamiaj vilaĝekstermoj, „tigraj kaĝoj", blinda furiozo de bombadoj per la plej rafinite perfektigitaj murdiloj: ankaŭ tie temas pri „haraĉo" de la militara-industria komplekso.

La unuan tradukon, siatempe, mi recenzis kun multa malfacilo: ne volante aflikti la oldan-meritan pioniron, en kiel eble plej dolĉan pilolon mi devis paki la malperfektaĵojn de lia laboro. Nun mi estas en nekompareble pli favora situacio: la nova traduko de J. Velebit estas nekompareble pli bona ol la antaŭa. Se en la malnova traduko la valoraĵoj de la verko validiĝis malgraŭ la traduko, nun, per la lerto de la nova tradukinto ili estas eĉ pli reliefigitaj. Kelka pezeco de lingvaĵo ŝajnas konscie farita por reprodukti la primitivan praforton de la originalo. Ankaŭ la iometajn poeziajn licencojn kaj sinerezojn mi nepre aprobas. La sola, kiun mi riproĉas, estas kelkaj kunfandoj de substantivo kun ĝia epiteto adjektiva (bonĉevalo, bonpaŝtisto). Miaopinie, se formo kaj gramatiko neeviteble kolizias, la antaŭa devas cedi, eĉ se tio kostas sinerezon aŭ ion similan. Speciala ĝojo estas, ke jen nova *retraduko* de klasikaĵo — tio mem montras la evoluon de la lingvo kaj de ĝiaj poeziaj uzantoj.

K. Kalocsay

Esperanto en la Budapeŝta Scienca Universitato

La Budapeŝta Scienca Universitato nomata laŭ la granda mondfama fizikisto *Loránd Eötvös* (1841—1919), speciale ĝia filologia fakultato, meritas nian apartan atenton pro tio, ke tie en 1966 komenciĝis instruado de Esperanto.

La Esperanto-fakon dekomence gvidas dro István *Szerdahelyi*. Komence li funkciis kiel „komisiita prelegisto", nun kiel adjunkto li akcelas la evoluon de la fako. Ties sukceson ilustras, ke nun, krom li, la gvidanto, kvar komisiitaj prelegistoj faras prelegojn aŭ gvidas seminariojn.

En la nuna lernojaro 1972—1973 ekzistas kvin gradoj de kursjaroj: en la dua (prepara) kaj en la tria lernas po sep studentoj, en la kvara kursjaro kvar kaj en la kvina naŭ studentoj. Ĉi lasta indiko signifas, ke fine de la nuna lernojaro jam naŭ studentoj ricevos la diplomon de profesoro de la lingvo Esperanto.

Estas grava rezulto ankaŭ tio, ke en septembro 1972 komenciĝis ankaŭ koresponda kurso por dek pedagogoj. Do Esperanton lernas en la Filologia Fakultato entute 37 studentoi.

Ni spektadas kun ĝuo 63-paĝan flavkovrilan kajeron, sur kies titolpaĝo legeblas: Filologia Fakultato de la Scienca Universitato Esperanto-Fako. Ĝi estas la instruplano kaj informilo de Esperanto. La eldonisto estas dro György Székely, dekano de la Fakultato. Bedaŭrinde la kajero aperis nur en 200 ekzempleroj, do nur por interna uzado.

La informilo komunikas detalan tabelon de la instruplano. Inter la instruobjektoj ni vidas la literaturon de Esperanto, la historion de la internaciaj lingvoj, listojn de la devigaj legaĵoj kaj de la proponita fakliteraturo.

En 30 punktoj estas resumitaj la postuloj de la ŝtataj ekzamenoj. La 30-a punkto estas: „Esperanto kaj la junularo: Esperanto en la lernejoj kaj universitatoj. La internacia organizaĵo de la esperantistaj pedagogoj kaj studentoj." — 27 aliaj punktoj enhavas la postulojn de la kompleksaj ŝtatekzamenaj temaroj. Jen ni vidu la 27-an punkton: „Kiajn pedagogiajn-didaktikajn eksperimentojn vi konas? La ĝis nun atingitaj rezultoj. Kiajn eksperimentojn vi povus efektivigi en via lernejo por mezuri la efikecon de la instruado de Esperanto?"

Kaj antaŭ ni kuŝas la nova lernilo de Szerdahelyi, ankaŭ nur por universitata uzado, aperinta en 330 ekzempleroj. La titolo de la libro estas: *Esperanto, Enkonduko kaj lingvoekzercoj.* Ĝi pretiĝis por la dua kaj tria jaroj. Ni bedaŭras, ke ankaŭ la libro mem ne estas por eksteruloj aĉetebla 1, pro sia interna karaktero kaj 2, pro la malalta eldonnombro.

En la Esperanto-Fako lernas ĉiam pli multaj eksterlandaj studentoj. Agadas en la universitato studenta rondo, kiu partoprenas en la scienca esplorado, en kolektado de la materialo por diversaj celoj. Jen kiel la gejunuloj riĉigas la sciencon de Esperanto.

Provizore sufiĉas elekti nur tiom el la fekunda laboro. Ni mem estas konvinkitaj, ke la ĉiam pli larĝa, pli altnivela Esperanta agado en nia Filologia Fakultato alportos ankaŭ la gloron por la tuta Universitato, ke tiu ĉi laboro inde viciĝos al la sciencaj atingoj de la tuta Universitato Eötvös Loránd.

L. Kökény

Internacia lernolibro

D-ro István Szerdahelyi: Esperanto 1, internacia lernolibro por la lerneja junularo. *Eldonis la Lernolibro-eldonejo en Budapeŝto sur 260 paĝoj kaj en 20 000 ekzempleroj. — Ni vivas en tiu epoko de la lerneja instruado de Esperanto, kiam la lingvo estas instruata en eksperimenta formo, sed oficiale, precipe en Orient-Eŭropo en najbaraj landoj, kies Esperanto-organizaĵoj kun patronado de la ministerio por instruado en kelkaj bazlernejoj fakultative instruas Esperanton. Al tiu ĉi grava entrepreno estis necese, ke en la kompetentaj landoj oni havu komunan lernolibron de Esperanto. Por tiu ĉi grava eksperimento estis elektita la Lernolibro de István Szerdahelyi, adjunkto de la Filologia Fakultato de la Budapeŝta Scienca Universitato. Szerdahelyi ja estas konata aŭtoro ankaŭ de rusaj lernolibroj, kaj en 1965 aperis lia Esperanto 1, en 1968 lia Esperanto 2, ambaŭ eldonitaj de la Ŝtata Lernolibro-eldonejo. Do kiam oni decidis eldoni la Esperanto 1 por internacia uzado, ekskluzive nur en Esperanto, la sama eldonejo surprenis tiun ĉi gravan taskon. La ĝoje salutata lernolibro konsistas el unu enkonduka leciono, el I—XXIV lecionoj, el sistema gramatiko, el instrumetodaj konsiloj (62 paĝoj!) kaj el alfabetlisto de la vortelementoj. — La plej diversaj modernaj metodaj rimedoj kontribuas al la alproprigo de la lernomaterialo. Ni ellevas la abundan provizon per instruaj, sprite desegnitaj figuroj de Anna Győrffy (kuj tiuj ĉi desegnaĵoj sukcesis teknike pli altkvalite, ol en la hungarlingvaj variantoj), krome la detalajn instrumentodajn konsilojn, kiuj servas utilege por ĉiuj lingvopedagogoj. Fabeloj, rakontoj, poemoj, ŝercoj kaj kantoj kun muziknotoj, tabeloj por enkapigo de la gramatikaĵoj, aroj da demandoj kaj respondoj ebligas, ke la lernantoj de la Lernolibro ricevu fortikan fundamenton de nia Esperanto.* (L. K.)

EKZAMENO SEN RISKO

Ekzamenanto: Vilmos Benczik

En la nuna numero ni ĉerpas la demandojn el la jubilea antologio de Kalocsay kaj Baghy, el *Ora Duopo.* Kiel lastfoje, ankaŭ nun oni devas respondi *du* el la subaj tri demandoj por partopreni en la lotumado de la libropremio.

1. La libro enhavas novelon de Baghy, titolitan „Tri kamaradoj". *Bonvolu skribi la nomon de ĉiuj tri.*

2. Sube ni citas unu verson el poemo de Kalocsay, aperinta en la volumo. *Bonvolu skribi la titolon de la poemo, el kiu la citaĵo estas ĉerpita.*

   „Ne, Auld, ne celon ni plenumas."

3. Ni citas strofon el tradukaĵo de Kalocsay. *Bonvolu skribi la nomon de la aŭtoro de la originalo.*

   „Ne sciis li, ke tie ŝi kuŝas sen vualo,
   Kaj Ruth nenion sciis pri voloj la ĉielaj.
   Parfumo freŝa flugis el tufoj asfodelaj,
   La flustroj de la nokto ekflirtis sur Galgalo."

Ne estu zorgo la gastigado!

Budapesti

Fűszer- és Édességnagykereskedelmi Vállalat

Budapeŝta

Pograndvenda Entrepreno de Spic- kaj Dolĉaĵvaroj

F B
füszért

Moderna pakaĵo, eminenta kvalito, variaj saporoj

Ni rekomendas ĝin al vi!

Profesoro Albert Szent-Györgyi

pri la verŝajna kuracmetodo de la kancero

La kancero verŝajne estas sekvaĵo de tio, ke en la malsaniĝonta organismo mankas iaj naturaj enzimoj, kaj verŝajne ĝi estas kuracebla per ekstrakto el bovída hepato — diris prof. *Albert Szent-Györgyi*, Nobel-premiita medicin-scienculo, en sia raporto prezentita en la printempa kunsida periodo de la Usona Scienca Akademio.

La scienculo primontris, ke en la plimulto de kazoj la kanceran plimultiĝon de la ĉeloj malhelpas certaj kemiaj elementoj, ĉeestantaj en la histoj, la t.n. *keton-aldehidoj*. Laŭ lia opinio, la estiĝo de unu aŭ pli da keton-aldehidoj povas esti malhelpata per tio, ke mankas la necesaj enzimoj. La scienculo kaj liaj kolegoj faris eksperimentojn ĉe musoj, kaj tiam pruviĝis, ke por malhelpi la evoluon de kancera tumoro estas bezonata ne pli ol unu gramo da mushepata ekstrakto. Ankaŭ la kuracado de artefarita kancero estis sukcesa ĉe ronĝuloj. Tian eksperimenton ĉe homo ili ankoraŭ ne faris.

La scienculo opinias, ke la bovid-hepata ekstrakto estos taŭga rimedo por malhelpi la evoluon de kancera tumoro (karcinomo). Prof. Szent-Györgyi sciigis en sia scienca raporto, ke manke de materiala subteno li ne povas plu daŭrigi siajn eksperimentojn. Estas konate, ke la mondfama scienculo gvidas la muskol-esploran instituton en Woods Hole (Massachusetts).

Ludoviko Kökény: Ni konversaciu Esperante!

Eldonis Hungara Esperanto-Asocio 1971.

120 paĝoj, 19 x 14 cm

Naskiĝis utila lernolibreto por tiuj, kiuj deziras dum mallonga tempo alproprigi bazgrade la internacian lingvon.

La aŭtoro, Ludoviko Kökény — konata nomo en Esperantujo — ankaŭ mem estas pedagogo. Do li havis eblon esplori fenomenojn, kiuj montriĝas dum lernado de lingvo. Baze de la observoj la lecionoj estas zorge kunmetitaj tiel, ke la kursanoj aŭ memlernantoj spertu sian rapidan progreson, precipe en komenco, kiam ĉe la unuaj malfacilaĵoj multaj el ili perdas la kuraĝon kaj rezignas pri la lernado.

La libreto entenas 12 ĉapitrojn, kiuj okupiĝas pri temoj plej ĉiutagaj: 1. Kontinentoj, landoj, urboj. 2. Budapeŝto. 3. Vizito en vilaĝo. 4. Le tempo kaj la vetero. 5. Kiel vi fartas? 6. Ni tagmanĝas. 7. Pri la virinoj. Geedziĝo. 8. Aĉetado. 9. En la Belarta Muzeo. 10. Sur montoj de Buda. 11. La sindikatoj. 12. En bazlernejo. — La lecionoj konsistas el kvar partoj: konversacio, legaĵo, vortlisto, gramatikaj klarigoj kaj demandoj. Tiu ĉi lasta, resumante la studhoran materialon, kvazaŭ devigas la lernantojn respondi laŭ propraj konceptoj. Bone vigligas la libreton la anekdotoj. Ni bedaŭras, ke pro financaj kaŭzoj mankas ilustraĵoj.

La eksteraĵo de la broŝurita volumeto estas modesta, multobligita laŭ rotaprinta procedo, tamen plaĉa. El la ĝis nun venditaj ekzempleroj oni povas konkludi, ke tiu ĉi libreto estos simile ŝatata, kiel estis la „Populara Lernolibro" — verkita same de Kökény — aperinta en 1947. Kaj ĝuste pro tio estus utile, eĉ bezonate aperigi ankaŭ duan volumon, kiu kondukus la lernantojn plu en la lingva perfektiĝado.

Ada *Csiszár*

Leterkesto

Trafoliumante la leterojn, ni kore salutas niajn legantojn.

„... mi ŝatas legi mian nomon inter la solvintoj. Mi ĉiam ĝojas pri tiuj enigmoj, kvankam solvi por mi estas malfacile, ĉar mankas sufiĉe da leksikonoj kaj lernolibroj kiel helpiloj. Mi anticipe dankas kaj kore salutas vin — Ilse Neumann, DDR, 88 Zittau, Löbauer Str. 14."

„Kompreneble, mi tre ĝojas pri la sukceso de via altnivela revuo, kies ĉefa kvalito estas krei tute veran internacian esprimmanieron pere de nia ŝatata lingvo. Do, vi baldaŭ aperos ses fojojn en jaro. Ĉiu konvinkita esperantisto devas senpacience atendi la venontajn numerojn. — Tre korajn salutojn de A. Bongars, 5 Allée des Peupliers 37700 St-Pierre-Corps, Francio".

„Vian revuon mi legadas regule (abonas ĝin nia E-junulara klubo en Bratislava), mi estas kontenta pri ĝia interesa enhavo. Plaĉas al mi ĝia kultureco, sen superflua politikado. Ĵus en Nro 3/72 al mi tre plaĉis la kovrilpaĝo, mi konsideras ĝin bonega, maksimuma eluzo de nigra-blanka tekniko. Mi opinias, ke tiatipa artaĵo estas ĉiam pli valora kaj alloga ol mezkvalita fotografaĵo. — Kun sinceraj salutoj kaj sukcesdeziroj Zdaněk Hostomsky, Szabóova 8, Bratislava, CSSR."

„Ĉar daŭre la tempo mankas al mi por skribi detale pri miaj impresoj pri la Hungara Kulturfestivalo, mi nun skribas mallonge. La semajno en Budapeŝt estis por mi plenvalora. Mi devas diri, ke la aranĝado de programo, ĉambro, transporto, ktp. estis tre zorga. Por mi muzikprogrameroj estis la plej interesaj. Budapeŝt estas belega urgo. Mi tre kore dankas al vi pro la agrabla semajno, samideane J. J. M. Klein, Doelstraat 23, Haarlem."

Krom la supre cititaj karaj legantoj la redaktoraro de HV tutkore salutas samideanojn: Klaus Klimt el Magdeburg, Linde Knöschke el Berlin (DDR), J. Szabó, Vilmos Torró, Ernesto Schlesinger el Rumanio, Anatolo Gonĉarov, Esperanto Klubo, Barnaul, Sovetunio, László Urinyi, Budapeŝt, Marin Bacev, Sofia, Viktor Aroloviĉ, Moskva, Petro Poliŝĉuk, Taskent, Uzbekistano, Sovetunio kaj ĉiujn aliajn, kiuj per leteroj serĉis nin kun konsiloj helpi nin por la plibonigo de la revuo. Dankon al ĉiuj.

Al Ernesto Schlesinger, Cluj, Rumanio. Ni opinias, ke oni ne devas esti tiel severa koncerne la personajn nomojn. Ni preferas lasi al ĉiu la rajton uzi laŭplaĉe nacilingvan aŭ E-an formon, precipe, ĉar pluraj nomoj eĉ ne estas esperantigeblaj. Ankaŭ ĉe la virinaj nomoj ni manipuladas kiel ni povas. Kion fari ekzemple, se *Jánosné Nagy*, t. e. *János-edza Nagy* ne sciigas nin pri sia fraŭlina nomo, aŭ se ĉi tiu nomo troviĝas en novelo, sen ties indiko, ĉu ŝi estas *Emőke* aŭ *Gyöngyvér*.

ŜERCOJ, RAKONTOJ

Lernolibra Eldonejo, Budapeŝto. 1972. 104. p. Formato 16x12 cm.

Ŝercojn, fabelojn, rakontojn, poemojn enhavas la libreto, kies materialon elektadis Vilmos Benczik.

La libro celas prezenti amuzajn, mallongajn leĝaĵojn — konvenajn ankaŭ por lingva praktikado — elektitajn el la monda kaj Esperanta literaturo. Inter la aŭtoroj troviĝas Andersen, Baghy, Deij, Kalocsay, Matute, Pumpr, Rosbach, Szathmári, Szilágyi, Ueyama, Zetterström ktp. Favore al la komencantoj, hungarlingvaj piednotoj helpas la komprenon de malpli konataj vortoj aŭ iom komplikaj esprimoj.

Agrabla broŝurita eksteraĵo, bone legebla tipografio, kelkaj preseraroj kaj bagatela prezo: 4 forintoj. Kion diri pli? Eble sufiĉu tiom: kiam ni prezentas tiun ĉi legolibron, la eldonita kvanto (3 mil) jam tute elĉerpiĝis kaj la recenzanto apenaŭ povis — eĉ prunte — akiri unu ekzempleron.

A. Cs.

Gyula Illyés



Anstataŭ arto poetika, ni citas la unuan strofon el la poemo de Gyula Illyés: *„Poetoj inter si"*. La tri versoj kaŝiĝas en la vicoj: H. 1, V. 12 kaj H. 8. (Ensendi sufiĉas nur la citaĵon)

Limdato de la ensendo: la unua de aŭgusto.
Inter solvintoj ni lotumos premiojn.

Horizontalaj vicoj: 12. Koncernanta fakulon pri artoj. 14. Havi ideon pri io aŭ iu. 15. Tabelvorto. 16. Beletra versa letero. 18. Asoci' 19. Io profite uzebla. 21. Absoluta, kruela regnestro. 22. FA 23. Kontraŭŝipa eksplodkesto. 24. Kolonia loĝanto de Kazohinio. 25. Vanado kaj osmio. 26. Malgranda hungara vilaĝo (UKK). 27. Liver' de ĉevaloj por armeo. 28. Brilblanka globet' uzata kiel juvelo. 29. Tantalo. 30. La konstruaĵo kie loĝas homoj. 31. Delikate plaĉa kaj alloga pro sia agrableco. 32. Varma suda vento 33. Orient' (neologismo). 34. Interna kava parto de la kolo, per kiu oni glutas kaj spiras. 36. Angla esperantisto, kunlaboranto de Zamenhof (Roŝo). 38. ŜE 39. Arbo konifera (abies). 40. Malvigleco de la organoj. 41. Ar' de du objektoj aŭ estuloj samspecaj. 42. Samaj konsonantoj. 43. Malgranda insektomanĝanta mambest', kies haŭto estas kovrata de pikiloj. 44. Mallarĝa, laŭlonga tru'. 45. ST 46. Certig', ke oni faros aŭ donos. 47. Literatura verk', destinita por esti dirita antaŭ publiko. 48. Tabelvorto. 50. Parto de fiziko, kiu koncernas la sonojn, sonaŭdebleco. 52. Element'. 53. Likva kombinaĵo de hidrogeno kaj oksigeno. 55. Gastejo, granda laŭ vertikala kaj suprenira direkto (du vortoj: adjektivo kaj substantivo). 57. Idon de longorela kvarpieda ŝarĝbesto.

Vertikalaj vicoj: 2. Esprimanta seksan volupton. 3. 3,14159 4. Dramo de Shakespeare, esperantigis Reto Rossetti. 5. Batilo konsistanta el ŝnuro aŭ rimeno alligita al ligna tenilo. 6ĉ AKI 7. Harmonia tutaĵo de interdependaj ideoj, kunordigitaj laŭ malmultaj fiksitaj principoj. 8. Antikva pezmezur' kaj grandvalora monunu' (Biblio). 9. Universala Kongreso. 10. Grammolekul'. 11. Kostum', kies formo kaj koloro estas samaj por ĉiuj anoj el la sama grupo. 13. Itala urbo, loko de FIAT fabriko. 17. Frakcio. 20. Kolora fluaĵ' uzata por skribi. 24. Ĝardena strio de tero por kulturi florojn aŭ legomojn. 25. Supra lok' de la kapo. 27. Amfibia vertebrula saltanta besteto. 28. Pasintaĵ'. 30. Deviga regulo. 31. Kapvesto sen elstara rando kaj sen viziero. 32. Ornama aranĝ' ĉirkaŭ vazo aŭ supre de pordo. 33. Angla virnomo (Eriko). 35. Malhelp', bar'. 36. Pen', por ke iu jam aganta agu pli vigle. 37. Baptonomo de soveta ŝtatviro Mikojan (ne esperantigita formo). 38. Samtempa skuo, tremigo kaj svingo. 40. Koncernan specialan paŝon en ŝakludo. 41. Pola Esperanto Asocio. 43. Esperanto Rondo Amika. 44. Plurfoje tien kaj reen premŝovi ion sur io. 47. Frakcia numeral'. 49. 1006 per romiaj ciferoj. 51. IHE 54. Valora metal'. 56. ED.

FERI

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 72/4 (Pri Literatura Mondo) estis: BALKÁNYI — SUTKOVOJ — DEKDU POETOJ — ENGHOLM — KOLOROJ — BLEIER — JÓKAI M. — ESPERANTA LIRO — MORGAŬ MATENE — RIMPORTRETOJ.

Libropremion gajnis: Johannes Palu, Solme 21, 200016 Tallin el ESTONIO; Arne Bengtsson, Åbybergsgatan 32, 431 31 Mölndal el SVEDLANDO; kaj Pál Osztein, 1076 Budapest, Garay tér 13—14 el HUNGARIO.

Ĝustan solvon ensendis ankoraŭ: (ĝis la 10-a de Februaro) el ANGLUJO: F-ino N. Hanson, Veronica Hewitt, Paul Hewitt; el BULGARIO: Atanas Gaev,; el ĈEHOSLOVAKIO: Aleŝ Bednařik, Adolf Ŝtanura,; el FRANCIO: André Bongars; el GDR: Linde Knöschke; el HUNGARIO: Ferenc Bartók, Károly Benkő, Lászlóné Bognár, Ferenc Egry, Lajosné Faragó, Béla Hubay, Károly Juhász, József Kiss, Lenke Kun, Károly Magyari, Balázs Szemők, Sándor Varga; el JAPANIO: Ŝitoŝi Hukaja; el POLLANDO: Urszula Zabek,; el RUMANIO: Emeric Jámbor kaj Julio Szabó; el SOVETUNIO: Esperanto Klubo de Barnaul, E. Purina, Rein Kiviaru kaj N. Rysovec; el USONO: Mrs. H. Linker Treasurer.

KORESPONDI DEZIRAS

ĈEĤOSLOVAKIO: Ján Chladvy, Bátovce 246 okr. Levice, ĈSSR.

POLLANDO: Anna Sowa, Bycnawa, ul. 20-ogo Lipca 154, woj. Lublin (18-j.) Jadwiga Zebrok, Cieszyn, ul. Hażlaska 15. Michalina Prus, Cyeszyn, ul. 1. Maja 18. („Miastoprojekt"). Antoni Nowak, Kielce, ul. Skalista 71/m3. (bildk.) Elizabeta Durziak, Nowa Ruda, ul. Stara Kolonia 11, woj. Wroclaw (17-j. bildk. fotoj de aktoroj.) Witold Symonowicz skoltgrupestra — Esperanto-Amikeco skoltgrupo, Gdansk16, ul. Dantyszka 1/3. (13—16-j.) Witod Kraskiewicz, Bygoszcz-2, ul. Kwiatowa 15 m7. (14-j. interes. matematiko, bildk.) Alina Pawelczyk, Bydgoszcz, ul. Solna 12 bl 5/m3. (24-j. bk.) Roza Slowinska, Szubin, ul. Browarna 4. (16-j. matem. bildk.) Irena Duleba, Bydgoszcz, ul. Traugutta 5/1. (24-j. bildk.) Leopolda Minkina, Bydgoszcz, ul. Solna 12 bl 1/1. (bildk.) Krzysztof Osmulski, Belchatów, ul. Lipowa 58. Woj. Lodzkie (20-j.) Maria Dziechciowska, Rabka, ul. Zaryte 15. pow Nowy Targ, woj. Kraków (22-j. liter. historia-milita 2.)

SOVETUNIO: Miĥail Kirillov, Moskvo V—321, Tjoplyj Stan-3, 37—301. (31-j. inĝen. — kol. liter, fotofakrevuojn, gramofondisk.) Jozefo Veitas, Klaipeda-2, Litovio, Ŝilutis plentas 6—518. (30-j. laboristo, k.d. kun tuta mondo E-e, angle. Interŝ. bk, pm.)

Interesaĵoj

La sovetaj kaj la usonaj scienculoj en la sama tempo diskonigis, ke ili sukcesis el la kosma spaco kapti radio-ondojn. Helpe de du egaj radioteleskopoj ili kaptis la misterajn signojn en Krimeo kaj en la okcidenta parto de la ŝtato Virginia. Laŭ hipotezoj la signoj „ekflugis" almenaŭ antaŭ unu miliardo da jaroj, el la medio de ia astro estiganta radio-ondojn. Ankoraŭ daŭras la esplortaksado de la signoj. La scienculoj atendas la solvon de pluaj interligoj kaj konkludoj el la „mesaĝoj" kaptitaj per la radioteleskopoj.

>·<

En nun konstruata loĝokolonio de Moskvo la domgrupo havas precizan rondformon, ĝi estas naŭetaĝa, havas naŭcent loĝejojn, kaj ĝia formo estas regula ringo. La rondforma korto estas komplete ŝirmata kontraŭ malvarmaj ventoj. En la korto estas plantotaj arboj kaj floroj, oni zorgas ankaŭ pri sportaj establaĵoj kaj ludplacoj. La konstruaĵaro baldaŭ pretiĝos.

>·<

Okcent kuracistoj de kvardek du landoj kongresis en Parizo, por diskuti pri la farotaĵoj kontraŭ la timige plimultiĝantaj publikvojaj akcidentoj kaj ankaŭ kontraŭ la lastatempe same grandskala konsumado de narkotaĵoj. Oni konstatis, ke en 1971 nur en ok landoj de Eŭropo (Granda Britujo, Francio, Italio, Germana Federacia Respubliko, Svedlando kaj la tri Beneluxstatoj) mortis 65 mil homoj sekve de publikvoja akcidento. Estas kalkulite: se ĉio ĉi plu daŭros laŭ tia mezuro, tiam ĉiun duan homon naskiĝintan en 1792 minacas pli aŭ malpli grava publikvoja akcidento.

>·<

En la matematika-fizika fakultato de la Kieva Universitato nun daŭrigas siajn unuajarajn studojn — laŭ sukcesa akcepta ekzameno — la 13-jara Tatjana Dvorak. Lia frato, Aleksandr, nun estas 16-jara, kaj nun finos la universitaton. Ilia pli juna frato, la 8-jara Vladimir, en la bazlernejo „saltis" du klasojn.

>·<

„Juna amiko" kaj la lernantaro

Post la apero de la provnumero de JUNA AMIKO mi povas publike resumi la problemkomplekson de la lerneja E-revuo.

La devizo de nia Movado: *„Esperanton en la lernejojn"*, esprimas ties rekonon, ke la ĝenerala disvastiĝo de Eo povas efektiviĝi nur per sistema lerneja instruado.

Ni jam faris multe por akiri konsiderindan pozicion en la lernejo, unuavice atentante la *instruistaron* (IPR, pedagogiaj seminarioj, Mariboraj konferencoj ktp.). Tamen, almenaŭ tiom, kiel la laboro de la pedagogoj, determinas la sukceson de niaj klopodoj ankaŭ la *lernantoj:* ilia inklino, fervoro kaj persisto. La plej grava, eĉ decida demando de la lerneja instruado estas, kiel teni vigla la interesiĝon de la lernantoj per tio, ke ili *ricevas* ion per Eo, ke ili profitas per Eo sufiĉe frue, antaŭ ol perdi sian paciencon? Kiel eviti la grandnombran forfalon de la lernantaro? Multe ni faras por tio levante la kvaliton kaj kvanton de la porinfanaj servoj: korespondado, kluboj, tendaroj, vojaĝoj, konkursoj, kolektado de interesaĵoj ktp. Tamen, ilia nivelo estas altigenda.

Plej grava instigilo estas sendube la lingva materialo: legaĵoj adekvataj al la aĝo kaj intereso, donataj ĝustatempe. Tamen, ni estas tre malriĉaj je infana literaturo, kaj la ekzistantaj fabeloj, aventurromanoj, poemoj ktp. kvazaŭ neglektas, ke niaj infanoj altprocente staras sur tre malalta lingva nivelo kaj tial ne povas ĝui la verkojn dediĉitajn al ili. Restas do por ili kiel ekskluziva lingva plezuro: la lernolibro. Ĉu ĝi kontentigas la flamantan junularon? Certe ne.

La plej evidenta rimedo de helpo montriĝas *speciala revuo* por la lernantoj. Sed *ĝi nepre ne estu nacikaraktera.* Tian periodaĵon, eĉ ne unun, ĉiu povas ja aĉeti en sia gepatra lingvo, kaj konkuri kun ili laŭ tipografia aspekto ni ankoraŭ ne kapablas. Sed Esperanto havas unikan avantaĝon kompare kun la naciaj gazetoj. Nia revuo povas rekte kaj vive kontaktiĝi kun la plej foraj landoj de la mondo. Neglekti tion, kaj eldoni ne internacian gazeton, estas absurdaĵo, signifas flanklasi la kvintesencon de nia lingvo. Por geknaboj, kiuj sopiras je konoj eksterordinaraj, alilandaj, eble eĉ ekzotikaj, *internacia revuo povas montriĝi forta allogaĵo.* Legi la vortojn de brazilano, vjetnamo, japano, islandano, pri kies gepatraj lingvoj li scias eble nenion; tamen senpere kontaktiĝi: *jen eksterordinara plezuro.*

Krom tio, tiu ĉi revuo donas celon, ne mondskalan, grandiozan sed lernindan. La akiritan lingvoscion la lernanto povas *memstare* uzi por malkovri novajn konojn. Vortoj trodraŝitaj dum la studhoroj ofte ricevas ĉi tie novan vivon per la kunteksto. La revuo servas do kiel intelekta ĝojo, kaj tio povas forte reefiki, stimulante la infanojn al ankoraŭ pli diligenta lernado.

Kaj agante konsekvence oni povas atingi relative frue ĉi tiun intelektan plezuron. Ĉe po du horoj semajne mezinteligenta 12-jara komencanto eklegas memstare niajn E-eldonaĵojn post ĉ. 4 jaroj, sed metodike redaktatan periodaĵon li uzos pli-malpli libere post 2 jaroj. Kiaj faciligoj ebligas duoble redukti la tempon ĝis memstara legado? (a) Uzado de la plej oftaj mil radikoj. Tio per si mem multe plifruigas la komprenon; kaj se mi ankoraŭ aldonas, ke ni intencas aperigi la elektitan minimumon en formo de malgrandaj kajeretoj sub titolo „Lerneja Ŝlosilo", tiam ĉiu povas prezenti al si la leksikan faciligon. (b) Simpla kaj klara vort- kaj frazkonstruo. (c) Evitado de malfacilaj gramatikaj formoj, kaj multaj aliaj malpli gravaj artifikoj.

Jen la ĉefideoj, kiuj gvidas la subskribinton de la ĉi-supraj linioj. Multaj el diversaj landoj aliĝis al li, kaj eldonis sub la protektado de HEA provnumeron de JUNA AMIKO. Nun ĝi estas elmontrita al vasta kritiko. Ĉiu rigardu ĝin kiel sian propran, kaj kunagadu por krei vere tre valoran periodaĵon. Disvastigu la revuon en ĉiuj medioj! Ĝia sorto kaj nivelo multe dependas de la eldonkvanto.

G. KURUCZ

HUNGARHOTELS
INFORMACIO
organizado kaj aranĝado de
ĉambromendo - monŝanĝo - kongresoj
nuptofesteno - bankedoj - koktelpartioj
tablorezervigo - kelvizitadoj - aranĝaĵoj
kavalkad - prezentadoj - presioakceptoj
sur tuta teritorio de Hungario
HUNGARHOTELS Budapeŝto, V. Petőfi S. u. 16 Tel: 180-642, 383-117 Telex: 22-4923

ĈU PLAĈAS AL VI HUNGARA VIVO

ABONU ĜIN POR VI KAJ VIAJ AMIKOJ

Bonvolu rigardi ankoraŭ la 2-an kovrilpaĝon!